

# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

POR PLUA  
PROSPERO

•

RIMARKINDA  
DATREVENO

•

POR PACA  
KOSMO

•

MEDICINISTA  
FESTO

•

REALIGITA  
REVO

•

INTERNACIA  
E-MUZEJO

•

INSTRUAJ  
PROBLEMOJ

•

POEZIO





# SCIENCA PROGRAMO POR PLUA PROSPERO

La homaro admirplene komentas la sinceran humanismon de la sovetianoj, ilian firman volon por liberigo de la mondo el la koŝmaro de eventuala estonta nuklea milito, esprimatajn, fare de la Ĝenerala Sekretario de KPSU Miĥail Gorbaĉov desur la tribuno de la okazinta fine de februaro j. k. XXVII kongreso de KPSU.

La civitanoj de Popola Respubliko Bulgario ĝoje akceptas tiun ĉi pacimpeton defende al la homa progreso. Brila esprimo de ĉi tiu senrezerva apogo estas la Tezoj de la XIII Kongreso de Bulgara Komunista Partio (BKP) pri la laboro por socia, ekonomia kaj kultura disvolviĝo de la lando dum la Naŭa Jarkvino (1986—1990) kaj ĝis la 2000-a jaro. Tio estas grandsignifa dokumento, montranta la pacan konstruan vojon de socialisma Bulgario al la estonto.

La Tezoj de la XIII Kongreso estis objekto de tutpopola pridiskutado. Ĝi reflektas la ĉefecelojn kaj la manierojn por ilia realiĝo konekse kun la ĉiufanka supreniro de Bulgario kaj de ĝia popolo. Oni povas firme aserti, ke tiu rimarkinda dokumento brile respegulas la sukcesojn de socialisma Bulgario en ĉiuj vivsferoj, post la 9-a de Septembro 1944 kaj precipe dum la jaroj post la Aprila Plenkunsido de CK de BKP en 1956. El iam malriĉa kaj postrestinta agrarlando hodiaŭ Bulgario transformiĝis en modernan industri-agraran ŝtaton, kiu rajte viciĝas inter la alte evoluintaj landoj en la mondo.

Laŭ la Tezoj, la periodo de la Naŭa Jarkvino kaj ĝis la 2000-a jaro estos por Bulgario tempo, dum kiu la scienc-teknika revolucio transformiĝos en bazon, en esencon de la batalo por konstruo de evoluinta socialisma socio. La rapida disvolvo de ĉiuj branĉoj de la ekonomio, la perfektigo de la administrado, la aktiva partopreno en la internacia distribuo de la laboro konstante kreskos kaj kune kun ili — ankaŭ la vivnivelo de la popolo, ĉiam pli plene kaj komplete estos kontentigataj ĝiaj kreskantaj materialaj, spiritaj kaj socialaj bezonoj. Ĉio ĉi, detale prezentita en la Tezoj, elmontras la althumanan esencon kaj la avantaĝojn de la socialisma sociordo, malkovras la estontajn poziciojn de socialisma Bulgario —

ĉiam pli surpeniranta disvolvo en la fruntaj vicoj de la monda progreso.

La socialisma socio estas juna socio, bezonanta pacon, tempon por realigo de sia misio, sin bazanta sur la noblaj streboj de la partio fari ĉion por prospero de la homo, por gardo de la paco, por internacia kunlaborado kaj interkompreniĝo.

En la Tezoj de la XIII Kongreso de BKP oni aparte emfazas la gravan respondecon de la socialismaj landoj por la estonto de la homaro, ilian firman volon alfronti la frenezajn planojn de la militemuloj — specialistoj pri nukleaj kaj astraj militoj. La strategio de la bulgaraj komunistoj kaj de la tuta bulgara popolo estas strategio de malstreĉiĝo de bonnajbareco kaj kunlaborado, de paca kunekzistado kaj de konkurado inter la du mondsistemoj. La aŭdaca kaj realisma programo por liberigo de la planedo el la minaco de nuklea ekstermo de la homa civilizo, solene proklamita de la XXVII Kongreso de Komunista Partio de Sovetunio, estas akceptata de la bulgara popolo kiel ununura savvojo por la homaro.

La bulgaraj esperantistoj, kiuj ĉiam estis sinceraj patriotoj kaj sindonaj internaciistoj, komprenas la Tezojn kiel esprimon de siaj propraj intimaj pensoj kaj revoj. Pli ol ĉiam hodiaŭ ĉiu bulgara civitano havas la noblan taskon ĉiufanke partopreni la senĉesan ekonomian, socialan, kulturen kaj politikan prosperon de sia patrujo, la defendon de la monda paco. Tio inspiras ankaŭ la bulgaran esperantistaron transformi la Tezojn en farojn, konigi al siaj korespondantoj eksterlande la tekston de tiu grava partia dokumento. Tiu ĉi programo por socialisma konstruado, por supreniro de Bulgario baziĝas sur la atingoj de la scienc-teknika revolucio.

La bulgaraj esperantistoj ne ŝparas krear la laboron kaj energion por plimulti la materialajn kaj la spiritajn riĉaĵojn de la lando kaj la popolo, por ke Bulgario evoluu en paco, por ke ĝia potenco kreskadu defende al la monda paco kaj feliĉa vivo de la homaro.

Haim LEVI



## RIMARKINDA DATREVENO

NANO KJUČUKOV,  
vic-prezidanto de BEA

Antaŭ 30 jaroj, en sia Aprila Plenkunsido (1956) la partio de bulgaraj komunistoj realigis gravegan faron: ĝi restarigis la rompitaĵajn dum la periodo de kulto al personeco Leninajn normojn kaj principojn de partia vivo kaj gvidado kaj metis solidan fundamenton de sia ĝenerala aprila gvidlinio. Tiu ĉi aprila politika linio estas krea daŭrigo kaj plua disvolvo de la Dimitrov-kurso por konstruado de socialisma socio en Bulgario, nova pli alta etapo de krea evoluo de la marksismo-leninismo en nia lando. En la proceso de ĝia realigo la partio montris maturecon kaj konsekvencon, riĉan spiritan kaj politikan-teorian potencialon.

Elokventa pruvo pri la ĝusta direkto de la partia aprila politiko estas la grandegaj atingoj en la materiala kaj spirita disvolviĝo de nova Bulgario. Dum la pasintaj 30 jaroj la nacia enspezo kreskis 8-oble, la bazaj fondusoj — 10-oble, la socia produktiveco de laboro — 8,4-oble, la industria produktado — 14-oble, la maŝinkonstruado — 61-oble, la kemia produktado — 55-oble. . . Gravaj pozitivaj ŝanĝoj efektiviĝis ankaŭ en la agrikultura mastrumo, en la mondkoncepto de la vilaĝanoj.

La aprila partia linio estas potenca, dinamika linio. Nuntempe ĝi signifas kunigon de la atingoj de la scienc-teknika progreso kun la avantaĝoj de la socialisma sociordo. Fakte hodiaŭ tio estas la kerno de la strategia politika kurso de Bulgara Komunista Partio. Konstrui maturan socialisman socion — tio signifas efektiviĝi scienc-teknikan revolucion; efektiviĝi tian revolucion — tio signifas konstrui la evoluantan socialismon. Nun la historia momento starigas tiun postulon kiel objektivan neceson. En la tagorodo de ĉiuj plenkunsidoj kaj kongresoj de la Bulgara Komunista Partio dum la pasintaj 30 jaroj de nova politika kurso tiu ĉi problem

estis ĉiam diskutata, sed en la nuna etapo de evoluo de nia socio ĝi estas starigita antaŭ la tuta nacio kiel plej grava solvenda tasko. La XIII kongreso de BKP vaste malfermas la pordojn por akcelita evoluo de la lando surbaze de scienc-teknikaj atingoj.

Dum la pasintaj kelkaj jardekoj nia ideologio pliriĉiĝis per la aprila koncepto pri la personeco. La aparta individuo pli profunde kaj amplekse konscias sian dignon, sian rolon en la publika vivo, sian respondecon antaŭ la socio. Tiu ĉi koncepto trovas la ĝustan vojon al la homaj koroj, plifirmigas la strebon al humaneco, la historian optimismon. Konfirmiĝis la vero, ke kreanto de l' historio estas la popolo — la nura kreanto de materialaj kaj spiritaĵoj.

La aprila politiko de la partio elmontriĝis en la vastigo kaj firmigo de la socia principo en la sistemo de la politika regpovo, kio estas nova momento en realigo de la socialisma demokratio. La soci-ŝtata kaj la ŝtata-socia principo en la sfero de kulturo estas grava atingo de la marksisma leninisma koncepto de nia partio.

Popola Respubliko Bulgario pruvis sian sperton pri dialektika unuiĝo de la enlanda politika situacio kaj de ĝiaj internaciaj pozicioj. La soci-politika kaj idea unueco, la stabileco de nia lando kaj ĝiaj senĉese kreskantaj ebloj faras ĝin dezirata partnero sur la internacia kampo. Nia lando partoprenas vastskale en la mondaj procesoj de socia evoluo kaj donas sian kontribuon al la kreo de internacia sekureco kaj pacaj kondiĉoj por la homaro sur la sojlo de la tria miljaro.

Kreanto de la aprila politika linio estas nia partia kaj ŝtata gvidanto Todor Jivkov — eminenta politikisto kaj ŝtatisto — fidela adepto de la marksismo-leninismo. Lia nomo estas nedisigeble ligita kun la ĉiufanka socialisma supreniro de antikva kaj juna Bulgario.

*La ĝojigaj sukcesoj, realigitaj dum la serenaj aprilaj jaroj estas argumento por patriota fiero de ĉiuj bulgaraj esperantistoj. Ili estas feliĉaj kaj dankemaj pro la kresko de Bulgara Esperantista Asocio dum tiuj sekundaj aprilaj jaroj. La okazinta en Sofio tuj post la Aprila Plenkunsido de*

*BKP en 1956 XXXII regula kongreso de BEA raportis, ke en la lando funkcias 44 E-societoj. Nun ili estas pli ol 300, kun 9300 membroj. Ankaŭ estonte — per siaj specifaj rimedoj kaj formoj de agado, la esperantistoj skribos kaj parolos pri la sukcesoj de Aprila Bulgario, glorigos ĝin en ĉiuj anguloj de la mondo.*



## DANKLETERO DE PROF. HUMPHREY TONKIN

Al Lia Ekscelenco S-ro Boris Cvetkov  
Konstanta Reprezentanto de Bulgario  
ĉe la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj  
11 East 84th Street  
NOVJORKO, NY 10028

Kara Ambasadoro Cvetkov,  
Nia Asocio estis treege kontenta ricevi la bonan novaĵon el Sofio, ke la Generala Konferenco de UNESKO akceptis rezolucion, kiu rekonas la atingaĵojn de Esperanto kiel rimedo por evoluigo de la internacia interkompreniĝo kaj atentigas pri ĝiaj eblecoj rilate la estonton.

Konsiderante la forton de la Esperanto-movado en via lando, tute nature Sofio devis esti la loko por akcepto de simila rezolucio. Tamen la subteno de via registaro estis fakte decida por la sukceso de la rezolucio. Mi estas certa, ke mi parolas en la nomo de ĉiuj niaj membroj, sendante al vi miajn dankojn kaj bondezirojn pro via kontribuo al la celoj kaj idealoj de Esperanto kaj al nia Asocio.

La novaĵo pri la rezolucio, mi estas certa, ke vi povas kompreni tion, disvastiĝas rapide. Esperantaj periodaĵoj kaj radioelsendoj atingas multajn angulojn de la mondo kaj ili portas la informon pri la subteno fare de via registaro de niaj penoj helpi la internacian interkompreniĝon. Ni estas dankaj pro la helpo kaj la amikeco de via registaro.

Almetite mi sendas al vi unu ekzempleron de la decembra numero de nia revuo, en kiu estas publikigitaj detalaĵoj pri la rezolucio, same kiel unu ekzempleron de nia Novjorka bulteno, kiu entenas la anglalingvan raporton pri la rezolucio.

*La 6-an de januaro 1986*

Sincere,

HUMPHREY TONKIN  
Reprezentanto de la Universala Esperanto Asocio ĉe  
la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj

## ALTE HONORITAJ ESPERANTISTOJ

La Ŝtata Soveto de PR Bulgario distingis nian estimatan kolegon kaj kamaradon IVAN KEREMIDĈIEV-ESPEROV per ordeno „POPOLA RESPUBLIKO BULGARIO“ — I grado, pro lia sindona partopreno en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, en la konstruado de nova, socialisma Bulgario, pro lia multjara aktiva ĵurnalista agado kaj lige kun lia 75-jara jubileo.

Al la nelacigebla, sinofera aktivulo de la bulgara kaj internacia esperantista movado, al la ĉefredaktoro de „Internacia Ĵurnalistoj“ kaj vic-prezidanto de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA), al nia amiko IVAN KEREMIDĈIEV-ESPEROV ni esprimas niajn plej korajn gratulojn pro lia datreveno kaj la alta ŝtata distingo kaj bondeziras al li fortan sanon kaj viklecon.

● ● ●

La prezidanto de E-societo „Ivan Vladkov“ en Drjanovo, la estimata GENO MANEV fariĝis 70-jara.

Naskita en la malgranda vilaĝo Jalovo — distrikto de Veliko Tŕrnovo, li ligis ŝtan junecon kun la impeto de la laborista klaso kaj ĝiaj bataloj kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo. Li lernis Esperanton en la malliberejo.

Post la 9-a de Septembro 1944 kamarado Manev laboras kiel meĥanisto, kiel partia kaj sindikata aganto. La granda amo de lia vivo restas la batalo por tutmonda paco kaj Esperanto. Jam 25 jarojn li estas gvidanto de la E-movado en urbo Drjanovo — 10 jarojn kiel sekretario kaj 15 — kiel prezidanto de la loka societo.

En la jubilea solenaĵo Slav Dimitrov — batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo, parolis pri la vivo kaj agado de Geno Manev.

Pro liaj grandaj meritoj la Ŝtata Soveto de PR Bulgario honoris k-don Manev per ordeno „Naŭa de Septembro“ — I grado.





Soveta kosmonaŭto Jurij Gagarin, unua fluginta en la Kosmo

Antaŭ 25 jaroj — la 12-an de aprilo 1961 — la mondo eksciis emocian, gravegan novaĵon: homo flugas en la Kosmo!... Realigis miljaraj revoj de l'homaro pri flugoj en la spaco!... La unua kosmonaŭto en la mondo estis soveta civitano — Jurij Aleksejeviĉ Gagarin, kies nomo estiĝis simbolo de komenciĝo de la nova, kosma erao, de konkero de la kosma spaco fare de l'homo.

Post la sukcesa lanĉo de la unua artefarita satelito de la Tero — „Sputnik“, la soveta scienco kaj tekniko akiris novan gloron, montris siajn grandegajn kapablojn solvadi malsimplajn kaj malfacilajn taskojn serve al la tuthomara progreso.

La flugo de Jurij Gagarin daŭris iom pli ol unu horo, sed ĝi estis nur la komenco de multaj novaj eksperimentoj kaj atingoj de la sovetaj sciencistoj, inĝenieroj, teknikistoj, medicinistoj kaj de miloj da aliaj kontribuintoj en esplorado de la Kosmo.

Ne malfruis novaj — ĉiĵoje kolektivaj! — flugoj de sovetaj kosmonaŭtoj. La nomoj de la kosmaj ŝipoj „Sojuz“ kaj de vico da bravaj kosmonaŭtoj kiel Valerij Bikovskij, German Titov, Andrian Nikolaev, k. a. estiĝis mondfamaj, ilin konas eĉ la unuakiasanoj.

## LA KOSMO POR PACAJ CELOJ!

Unua virino-kosmonaŭto estas la soveta civitanino Valentina Tereškova.

Dum tiuj kosmaj flugoj oni faris valorajn esplorojn pri la kosma spaco, observojn pri influo de la stato de senpezeo sur la homan organismon, observojn de la tersurfaco, provojn pri teknikaj operacioj ekster la kosma ŝipo en libera spaco. Estas plenumitaj ankaŭ multaj aliaj sciencpraktikaj taskoj, kiuj pliriĝis la sciencon pri la Kosmo.

Rezulte de la grandioza programo de Sovetunio pri kosmaj esploroj en la spaco estis lanĉitaj pli ol mil artefaritaj satelitoj de la Tero kun diversaj esplortaskoj: meteorologiaj, geologiaj, medicinaj, astrofizikaj, ktp. Efektivigita estis kuplado de kosmaj ŝipoj de la tipoj „Sojuz“ kaj „Saljut“, kiuj estas prototipoj de estontaj kosmaj stacioj. Sub komando de la kosmonaŭto Leonid Kizin teamo de scienculoj-esploristoj efektivigis la plej longdaŭran ĝis nun senĉesan (pli ol 6 monatan!) flugon en la Kosmo. Sur la Luno ekruliĝis la radoj de la lanĉita de Sovetunio esplorveturilo „Lunoĥod“, kiu sendis al la teraj laboratorioj multajn valorajn informojn pri la Luno.

La farojn de Sovetunio postsekvis Usono. Post multaj provoj kaj kosmaj flugoj, unuan fojon en la homa historio homo surpaŝis la lunsurfacon! Tiu homo estis la usona kosmonaŭto Armstrong. Realigis sukcese ankoraŭ unu el la revoj de l'homaro — interplaneda flugo, vizito de alia astro!...

Al la planedoj Venuso, Marso, Jupitero, k. a. ekflugis diversaj sovetaj kaj usonaj kosmaj esplorstacioj, kiuj sendis al la teraj laboratorioj multajn interesajn informojn. La komuna kosma esploragado fare de Sovetunio kaj Usono rezultis ankaŭ la unuan dum tiuj 25 jaroj kupladon de la soveta kosma ŝipo „Sojuz“ kaj

la usona „Appolo“. Tiu ĉi unua komuna flugo estis komenco de plua internacia paca kunlaborado en la kosma spaco. Estis realigitaj multaj flugoj kun internaciaj teamoj: kune kun sovetaj kosmonaŭtoj en la Kosmo flugis ankaŭ kosmonaŭtoj el Hindio, Vjetnamio, Kubo, Ĝeĥoslovakio, Francio, GDR. En la kosmo estis ankaŭ la unua kosmonaŭto-esperantisto — la hungaro Bertalan Farkaš. Eble iun tagon novaj esperantistoj postsekvos lian ekzemplon?!

El la Kosmo la mondo aŭdis ankaŭ bulgaran parolon: kune kun sia soveta kolego Nikolaj Rukaviŝnikov flugis la unua bulgara kosmonaŭto kolonelo Georgi Ivanov. Ili ambaŭ efektivigis tre komplikajn, eĉ danĝerajn, tamen sukcese finiĝintan flugon kaj kontribuis por plua teknika perfektigo de la kosmaj ŝipoj „Sojuz“.

Jam plurajn jarojn bulgaraj astronomoj, astrofizikistoj kaj aliaj specialistoj partoprenas aktive la programon „Interkosmos“ kaj havas gravan kontribuon por ĝia realigo. Sur multaj artefaritaj satelitoj estis muntitaj niaj ekipaĵoj kaj aparatoj, kiuj sukcese pasis la elprovojn.

Sed la usonaj militemuloj evidente ne estas kontentaj pri tiu paca internacia kunlaborado en la Kosmo. Ili strebas utiligi la spacon por siaj militplanoj, por instalado de „astraj“ armiloj kontraŭ Sovetunio kaj la landoj el la socialisma komuneco. La ordinarnaj homoj boneĝe komprenas la monstran minacon kontraŭ la vivon kaj la civilizon kaj energie kontraŭstaras al tiuj danĝeraj provoj de la imperiistoj transformi la Kosmon en militarenon.

La Kosmo apartenas al la tuta homaro kaj ĝi devas servi nur al pacaj noblaj celoj — pere de internacia kunlaborado al plua esploro de la Universo!

Radi BANĈEVSKI

## FIDELAJ AGANTOJ DE NIA SANPROTEKTADO

Ankaŭ ĉi-jare la medicinistoj kaj sanitaraj laboristoj en nia lando celebras sian profesion feston — la 7-an de aprilo! En tiu tago ili raportas pri la sukcesoj de nia socialisma sanprotektado, pridiskutas la novajn taskojn, starigitajn de la XIII kongreso de Bulgara Komunista Partio. La iniciatoj de la Ministerio de Publika Sano, de Medicina Akademio kaj de la Profesia Unuiĝo de Medicinistoj desegnas klare novajn horizontojn por plibonigo de la sanprotektado surbaze de la plej novaj sciencaj atingoj de la medicino tutmonde kaj dank' al la novaj organizo kaj stilo de laboro. Oni laboras por plua plibonigo de la sanprotektado ĉe infanoj, gelernantoj, laboristoj en la entreprenoj kaj en la kamparmastrumo. Ankaŭ kuracistoj en la kampo de profilaktiko donis sian kontribuon al la popola sanprotektado. Oni enkondukis novajn, tre efikajn metodojn de esplorado, diagnostiko, kurado kaj resanigado.

La 7-a de aprilo estas Internacia Tago de la Sano. Tiu tago unuigas la pensojn kaj farojn de la progresemaĵoj homoj el la tuta mondo por garantio de sanprotektado kaj sociala bonfarto por ĉiuj popoloj, por prevento de la nuklea milito, por paco kaj interkompreniĝo. Jen kial la Tago de Medicinistoj estas penetrita de profunda humaneco kaj socia enhavo.

La kuranta 1986 estas proklamita fare de UN kiel Jaro

de la Paco. Tio estas premiso por pli da justeco, por forigo de la militminaco, por likvido de la nukleaj arsenaloj. Pro tio la bulgaraj medicinistoj aktive subtenas la internacian movadon „Kuracistoj el la tuta mondo kontraŭ la atommilito“!

Ege disvastiĝis la internacia kunlaboro en nia sanprotektado, plivigliĝis nia partopreno en la agado de la Monda Organizaĵo por Sanprotektado (MOS). La bulgaraj medicinistoj havas konkretan kontribuon por realigo de la slogano de MOS: „Sano por ĉiuj al la 2000-a jaro!“ Tio signifas aktivan batalon por likvido de la senlaboreco kaj malsatado, por garantio de bona sanstato kaj sociala progreso en la mondo. Tiun ĉi devizon oni povas realigi nur en kondiĉoj de paca konstruado kaj interkompreniĝo en la nomo de vivo.

La bulgaraj medicinistoj-esperantistoj — kuracistoj, stomatologoj, farmaciistoj, fleĝistinoj, akuŝistinoj, apotekistoj aktive kaj abnegacie plenumadas la postulojn de nia sanprotektado. Krome, per Esperanto kaj dank' al sia internacia korespondado ili popularigas la principojn de nia socialisma sanprotektado en eksterlando, aplikas la pozitivan fremdan sperton kaj novajn labormetodojn. Dum la V Internacia Medicina Esperantista Konferenco (IMEK) en septembro 1985, en urbo Schwerin (GDR), niaj medici-

nistoj-esperantistoj per sciencaj raportoj propagandis la atingojn de nia lando en la sfero de sanprotektado, kontribuis al plialtigo de la internacia aŭtoritato de la bulgara medicino. En junio ĉi-jare la Medicina Esperanto-Sekcio ĉe BEA, kunlabore kun la Scienca Medicina Societo pri Fizioterapio, Kurortologio kaj Resanigado kaj la Scienca Societo pri Geografia Medicino organizos en urbo Bankja scienc-praktikan konferencon pri temo „Vivmaniero konforma al la higieno“. Oni turnos specialan atenton al la rolo de la racia nutrado, mova reĝimo, sobreco, reĝimo de laboro kaj ripozo, kreo de aktiva pozicio en la batalo kontraŭ amasaj modernaj malsanoj.

Estas vaste konate, ke medicinistoj staras en la frunta kolono de batalantoj por sano, laborkapablo, longvivado de la popolo. Ne estas alia pli althumana kaj pli nobla profesio ol tiu de medicinistoj, samkiel ne ekzistas pli granda riĉaĵo ol la sano kaj laborkapablo de la popolo.

Okaze de la festo de medicinistoj — niajn gratulojn kaj plej sincerajn bondezirojn pri novaj kreosukcesoj al ĉiuj bulgaraj medicinistoj-esperantistoj, fidelaj agantoj de nia socialisma sanprotektado!

Prof. d-ro Kiril POPOV,  
prezidanto de la Medicina  
Esperanto-Sekcio ĉe BEA

### DANKESPRIMO

Al ĉiuj, kiuj sendis al mi siajn gratulojn kaj bondezirojn okaze de mia 60-jariĝo, mi esprimas mian elkoran dankon kaj pardonpetas pro malebleco persone respondi al ĉiuj skribintoj.

En la vivo de ĉiu homo ne estas pli granda ĝojo kaj kontenteco ol tiu — konstati kiom multe da sinceraj amikoj li havas!

Koran dankon!

Amike kaj samideane via  
DONČO ĤITROV



# REALIGITA REVO

Ligoj inter bulgaraj kaj rusaj esperantistoj ekzistas jam de la unuaj jaroj post la apero de Esperanto. La pioniroj de la Internacia Lingvo en nia lando komencas korespondi kun la plej eminentaj rusaj esperantistoj, interŝanĝi literaturon kaj salutleterojn. Tiu korespondado plivigliĝas en la komenco de nia jarcento. Estas informoj, ke eĉ dum la Unua Mondmilito ekzistis ligoj inter la bulgaraj kaj rusaj soldatoj kaj oficiroj-esperantistoj. Post la milito, dum la regado de Bulgara Agrarana Popola Unuiĝo, la kontaktoj disvastiĝas. La bulgara E-gazetaro publikigas informojn pri la evoluo de la E-movado en Soveta Rusio. En tiu tempo esperantistoj aktive partoprenas en la amasa kampanjo de la komunista partio por kolekto de monrimedoj kaj nutraĵoj por la malsantaj el la regiono de Povolĵie.

La Naŭajunia puĉo en 1923 kaj la ĝin sekvinta faŝista diktaturo tamen malhelpas tiujn ligojn. Malgraŭ la malpermeso de la faŝista reĝimo en Bulgario niaj progresemaj esperantistoj serĉas manierojn daŭrigi la korespondadon kun iliaj sovetaĵ amikoj laŭ flankaj vojoj. Ili sendas siajn leterojn al samideanoj el Francio, Germanio, Ĉeĥoslovakio k. a. landoj, kiuj siaflanke resendas ilin al la sovetaĵ esperantistoj, kiuj respondas laŭ la sama maniero.

La bulgaraj faŝistoj kaŝadis la veron pri la socialisma konstruado en Sovetunio, sed la laboristoj-esperantistoj per siaj eldonadoj „Balkana Laboristo“, „Internacia Lingvo kaj „Internacia Laborista-Kampana Korespondanto“ popularigis la sukcesojn de la sovetaĵ laboristoj,

rakontis pri ilia libera vivo. Dum la perarmila batalo kontraŭ la monarko-faŝista registaro, persekutataj, la bulgaraj adeptoj de Esperanto revis renkontiĝi kaj korespondadi kun siaj samideanoj el Sovetunio.

La socialisma revolucio en Bulgario, venkinta la 9-an de septembro 1944 dank' al la decida helpo de la Soveta Armeo, metas la komencon de liberaj ligoj inter la bulgaraj kaj sovetaĵ esperantistoj. Ili jam povis libere korespondadi, interŝanĝi literaturon, fari reciprokajn vizitojn. La rilatoj aparte aktiviĝas dum la 60-aj kaj 70-aj jaroj.

Per la fondo de ASE en 1980 komenciĝis nova etapo en la evoluo de la soveta E-movado kaj de la kontaktoj inter bulgaraj kaj sovetaĵ esperantistoj.

Kreiĝis premisoj pri subskribo de kontrakto inter BEA kaj ASE, kiu indiku la direktojn de estonta kunlaborado, serve al la paco kaj socialisma konstruado en nia lando.

La 20-an de novembro 1985, en la Domo de Amikeco inter la Popoloj en Moskvo, reprezentantoj de BEA kaj ASE subskribis Kontrakton pri Amikeco kaj Kunlaborado inter ambaŭ asocioj. Per la subskribo de tiu kontrakto estis realigita longjara revo de la bulgaraj esperantistoj. Surbaze de tiu ĉi kontrakto oni pretigos perspektivajn kaj konkretajn jaraĵn planojn pri kunlaboro en la socialisma konstruado.

La bulgaraj esperantistoj akceptas tiun gravan akton kun granda ĝojo kaj konsideras ĝin kiel nian modestan kontribuon por stabiligo de la viviga bulgara-soveta amikeco.

Dimităr PAPAŬOV,  
Ĝenerala Sekretario de BEA

## KONTRAKTO PRI AMIKECO KAJ KUNLABORO INTER BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO KAJ ASOCIO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ

Dezirante kontribui al la multflanka pliprofundigo de la amikeco inter Bulgara Popola Respubliko kaj Unio de Sovetaĵ Socialismaj Respublikoj;

gvidataj de la deziro konservi kaj daŭrigi la tradiciojn de kunlaboro inter bulgaraj kaj sovetaĵ esperantistoj;

lige kun la plilarĝigo de la kunlaboro inter BEA kaj ASE, la pliriĝigo de reciprokaj kontaktoj, interŝanĝo de sperto kaj plifortigo de la amikeco inter bulgaraj kaj sovetaĵ esperantistoj

BEA kaj ASE interkonsentas pri la jenaj punktoj de la kontrakto:

1. Organizi aranĝojn lige kun la pacbatalo kaj serenigo per partopreno de reprezentantoj el Bulgario kaj Sovetunio, disvastigi pacalvokojn, kolekti subskribojn de esperantistoj-pacbatalantoj ktp.

2. Interŝanĝa partopreno de reprezentantoj el ambaŭ landoj en diversaj scienc-praktikaj konferencoj,

POR BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO:

VICPREZIDANTO: Nano KJUĈUKOV  
ĜEN. SEKRETARIO: Dimităr PAPAŬOV

Moskvo, 20-an de novembro 1985

kongresoj ktp., interŝanĝo de scienca literaturo en Esperanto.

3. Interŝanĝi reprezentantojn el ambaŭ landoj en seminarioj kaj kvalifikejoj por aktivuloj kaj E-gvidantoj.

4. Sur la kampo de kultura agado interŝanĝi artistojn, E-trupojn, partoprenantojn en revuoj kaj festivaloj pri E-parolo, kanto, literaturo; interŝanĝi kreaĵn vizitojn.

5. Por propaganda laboro eldoni kaj interŝanĝi, aŭ kunlabori por la eldono de revuoj, gazetoj, bultenoj, afiŝoj, libroj, reklamaj afiŝoj, filmoj; organizi ekspoziciojn.

6. Fari interŝanĝon de sperto inter estraroj de la junularaj sekcioj, korespondmaniere kaj per partopreno de gejunuloj en diversaj junulaj E-aranĝoj en ambaŭ landoj.

7. Plue evoluigi la kontaktojn inter la sekcioj de BEA kaj ASE.

POR ASOCIO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ:

PREZIDANTO: prof. Magomet ISAJEV  
RESP. SEKRETARIO — Lidia ŜANINA

## LA INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN VIENO (IEMV)

Estis en la jaro 1927, kiam okaze de la 19-a Universala Kongreso de Esperanto en Gdansk, en kunveno de la delegitoj de la landaj organizoj, Felix Zamenhof, la frato de la en 1917 elmondiginta elpensinto de Esperanto, D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, faris la proponon, establi ie en la mondo okaze de la 50-jara jubileo de Esperanto (1937) internacian Esperanto-bibliotekon. Kortega konsilisto Hugo Steiner, kiu ĉeestis la kunvenon kiel aŭstria reprezentanto, ekkaptis la ideon, por ĝin tuj efektivigi. Reveninte hejmen, li hazarde trovis komprenemon ĉe la tiama kanceliero.

Tiam en Vieno estis granda manko de loĝejoj kaj tial la naskiĝloko de la Muzeo estis iama ĉevalejo en la centro de la urbo (Annagasse 5) en ŝtata konstruaĵo kun pruntprenitaj tablo kaj du seĝoj. Du libervolaj helpantoj estis la unuaj kunlaborantoj. Malavaraj libro-donacoj el Aŭstrio kaj eksterlando alvenis kaj ĉar la disponebla loko jam en 1928 fariĝis tro malgranda, Steiner, kiu estis ankoraŭ turmentata per la zorgo, de kie preni la rimedojn por fruktodona pluevoluado, provis aligi la Muzeon al Nacia Biblioteko kaj sukcesis. La 30-an de septembro 1928 la kontrakto inter Nacia Biblioteko kaj la asocio „Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno“ estis subskribita. Per ĝi la materialo de IEMV estis certigata, ricevis kiel „Corpus separatum“ apartan starlokon kaj la Nacia Biblioteko (NB) ankaŭ transprenis la kostojn por la laŭorda traktado de la materialo. Oni sinsekve disponigis al IEMV du ĉelojn en la al N.B. apartenanta iama monaĥejo de la Aŭgustenaĵoj kiel provizoran laborejon. Nur en 1930 Steiner povis translokiĝi la Muzeon en grandan salondon en „Neue Burg“ (parto de „Hofburg“), al kiu venis en 1936 20 je 11 m granda salonego. Ek de 1-a de julio 1930 regula laboro povis esti komencata en la nova hejmo, ree kun du kunlaborantoj, kiu ambaŭ ricevis nur malgrandajn monajn rekompencojn de la muzea asocio. Nun la jam amasiĝinta materialo de libroj, broŝuroj kaj de aliaj presproduktoj povis esti prilaborata. La akiraĵoj estis, kiel restis ĝis nun, preskaŭ senescepte dona-

coj flanke de la esperantistaro, inter ili tre imponaj. En la lastaj jaroj heredigis kelkaj esperantistoj, kiel ankaŭ la fondinto de la Muzeo mem, siajn valorajn privatbibliotekojn al IEMV. Ankaŭ speciala muzea materialo venis multnombre dum la ekzisto de la Muzeo.

En 1938 la nazi-reĝimo fermis la Muzeon kaj Steiner estis „ŝirm“ arestata dum 3 monatoj. Ree libera Steiner iris al komisara gvidanto de N.B. por informi sin pri la sorto de IEMV, klarigante ke la tuta kolekto konsistas el donacoj de esperantistoj el la tuta mondo sub la kondiĉo, ke ili estos konservataj kaj alireblaj por la publiko. La komisaro diris, ke nenio estos pereigata, sed deponata sen esti nuntempe uzebla. Teruran sorton havis kunlaboranto Gustav Weber, kiu mortis en la koncentrejo Mauthausen, kelkajn tagojn antaŭ fino de la „miljara“ regno.

1945 — la liberighoro venis! En ĉi tiu jaro IEMV ricevis helpe de kanceliero ing. Leopold Figl kvin aliajn salonegojn en Hofburg-Reichskanzleitrakt. Ĉar la ejoj estis en malbona stato, la necesaj renovig-laboroj daŭris ĝis la komenco de 1947. Per malmultaj helpantoj, inter kiuj depost 1947 ankaŭ la vidvino de s-ano Weber, la tuta muzea materialo (preskaŭ nenio mankis) devis esti portata 147 ŝtupojn supren en la Muzeon. Sed neniu meblaro enestis en la kvin salonegoj kaj jen amiko de Steiner, la estro de la ŝtata meblodeponejo, registara konsilisto Pfund, helpis en vastanima maniero. De 1947—1949 elspezoj, antaŭ ĉio rekompencoj al la kunlaborantoj devis esti pagataj el la donacoj kaj kotizoj de la membroj de la Asocio. Nur de oktobro 1949 subvencioj estis donataj flanke de la Ministerio pri Instruaferoj. Nun oni ekordigis la materialon, la libro pri alveninta materialo mankis, la slipkatalogo estis perdiginta, sekve granda laboro por jaroj. Sed jam la 25.10.1951 pro bicikloakcidento de Steiner okazis kelkmonata malhelpo en la kutima laboro. Depost 1957 laboris en la Muzeo du sekretariinoj kaj ricevis ankaŭ salajron de la Ministerio. En 1957 Steiner eldonis katalogon pri la Esperanto-literaturo de IEMV kaj

en 1958 — duan volumon pri la literaturo de la aliaj sistemoj kaj provoj de internacia lingvo, ambaŭ laŭ la internacia dekuma sistemo.

En 1958 Steiner fine sukcesis ricevi por la Muzeo laŭnorman postenon de la grupo „B“ (oficisto kun matura ekzameno), kiu en 1960 estis ŝanĝata al grupo „A“ (oficisto kun akademia grado), kiun nun la depost oktobro 1958 en la Muzeo laboranta kaj nuna direktoro (post grava operacio en aŭgusto 1965 Steiner transdonis la gvidadon de la Muzeo) okupas. Ek de julio 1966 estas en la Muzeo ankaŭ nova posteno „B“. La fondinto de la Muzeo plue estis en kontraktaj rilatoj kun la Ministerio kaj ricevis monan rekompencojn. La du sekretariinoj estis maldungitaj laŭ ministeria ordono por ŝpari monon!

En siaj lastaj vivojaroj Steiner pretigis alfabetan katalogon pri la tuta literaturo en la posedo de IEMV. La 1-an de aŭgusto 1969 mortis Steiner en sia 92-a jaro. Nur la unua volumo de la katalogo (literoj A-L) estis preta kaj estis eldonita post finredakto de la posteulo.

La multspeca kaj granda laboro en IEMV estas nun en la manoj de nur du oficistoj. Precipe la jaro 1970 kaŭzis multe da laboro. Por la 55-a Universala Kongreso oni instalas specialan ekspozicion kaj modernigis kaj iomete ŝanĝis la konstantan ekspozicion.

Nun kelkaj linioj pri la kvin ejoj de la Muzeo:

Du salonegoj enhavas la bibliotekon kaj la konstantan ekspozicion, laŭokaze ankaŭ specialan ekspozicion. En la konstanta ekspozicio oni povas vidi en 22 metode aranĝitaj vitrinoj krom la unua lernolibro de Zamenhof originalan literaturon en Esperanto kaj diversajn tradukojn el la mondliteraturo, kiel ekzemple la Odiseon de Homero, la Roland-kanton, la Dian Komedion de Dante, memkompreneble la Biblion kaj la verkojn de Goethe, Schiller, Grillparzer, Shakespeare, Molière, Hugo, Tolstoj, Puŝkin, Gogol, Maĉach, Andersen, Lagerlöf kaj de

multaj aliaj. Ekspoziciataj ankaŭ estas antologioj de diversaj landoj, religia literaturo, vortaroj, terminaroj, infanlibroj kaj politikaj traktatoj. Ĉar IEMV samtempe estas scienca instituto pri la internacia lingvo, unu vitrino estas dediĉata al aliaj sistemoj de planlingvo. En aliaj vitrinoj oni vidas Esperanto-memoraĵojn, bezonaĵojn kun Esperanto-surskriboj, Esperanto-insignojn kaj Esperanto-poŝtaĵojn. La tria kaj ronda ejo estas la „Panteono“, en kiu la nomoj de la pioniroj estas eternigitaj. Sur la muroj pendas la bildoj de Zamenhof kaj de liaj familianoj, de Steiner kaj el la historio de la movado kaj IEMV. Modeloj de la Zamenhof-monumento en Vieno kaj de la Esperanto-monumento en Linz ornamas la ejon, memoraĵoj pri Zamenhof kaj Steiner estas vi-

deblaj en vitrino. La kvara salonego (ne vizitebla) entenas la gazetkolekton kaj literaturon en blindulskribo kaj la kvina estas la oficejo.

Nia biblioteko havas nun preskaŭ 17 000 volumojn (la nombro enhavas ankaŭ la binditajn gazetjarkolektojn, — ne unuopajn gazetnumerojn!). Proksimume 260 diversaj gazetoj el la tuta mondo venas regule kaj el ili plejparte estas ĉerpataj la informoj, kiuj en konciza mallongigita formo estas publikigitaj en la de IEMV kvaronjare eldonata „Informilo“. En proksimume 800 ekzempleroj la Informilo iras al la membroj de la muzeo-asocio en ĉiuj kvin kontinentoj. Do ni havas ankaŭ diversajn specialajn kolektojn, kiuj konsistas el: 210 aŭtografoj, plej multe

korespondadoj de Zamenhof en originaloj kaj fotokopioj, 250 muziknotoj de komponitaj Esperanto-tekstoj aŭ pri verkoj el la internacia muzikliteraturo, kies tekstoj estis tradukitaj en Esperanton, 4 000 fotoj, 85 diskoj kaj sonbendoj, 6 700 gazettelranĉoj ordigitaj laŭ landoj, 450 afiŝoj, 3 000 glumarkoj kun Esperanto-simboloj aŭ tekstoj en aŭ pri Esperanto (malgranda nombro ankaŭ en „Ido“) kaj 580 muzeaj objektoj. Preskaŭ 24 000 maldikaj presaĵoj estas aparte pritraktataj kaj konsistas el prospektoj por la fremdultrafiko, varb- kaj kongresmaterialoj, vidajkartoj ktp.

Forlasante nian, pli bone vian Muzeon, vi certe konstatos: „Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno estas la plej bela monumento honore al Zamenhof kaj al Internacia Lingvo.“

**D-ro Walter HUBE,**  
direktoro de IEMV

## Fruktodona seminario

Dum la lastaj jaroj en multaj E-unuiĝoj, inkluzive Bulgara Esperantista Asocio, laboras salajrataj kunlaborantoj, kiuj zorgas kaj respondecas pri plua disvastigo de la Esperanto-movado kaj pri instruado de la Internacia Lingvo. De ilia kompetenteco kaj konoj certgrade dependas la efektivigo de la taskoj, starigitaj antaŭ ĉiuj esperantistoj en nia lando de la 41-a kongreso de BEA.

La 4-an kaj la 5-an de februaro j. k. en la Internacia E-Kursejo en Pisanica unuafoje estis organizita seminario por la salajrataj kunlaborantoj de la Centra Oficejo (CO), de la Distriktaj Estraroj de BEA kaj tiuj de IEK. La programo de la seminario estis streĉoplena kaj daŭris po 10-12 horojn tage. Apartan atenton oni turnis al la organiza laboro de la distriktaj estraroj de BEA kaj al la E-societoj. Surbaze de la raporto de Dimităr Papazov, ĝenerala sekretario de BEA, la partoprenantoj vigle traktis la problemojn de planado, stilo kaj

metodoj de la organiza laboro — precipe tiu de la E-aranĝoj en la apartaj distriktoj. Ĉvetka Miteva, Vasil Vutov kaj Dimităr Petrov el CO de BEA traktis detale la problemojn pri la kadrujoj kaj aktivuloj de nia asocio, pri ilia instruado kaj kunlaborado, pri la dokumentado kaj kvalifikado de la aktivularo. Pri la tuŝitaj problemoj vigle diskutis multaj el la ĉeestantoj — precipe reprezentantoj de distriktaj estraroj en Pleven, Stara Zagora, Plovdiv, Jambol, k. a., kiuj dividis sperton kaj faris interesajn proponojn pri la estonta agado. Grandan intereson provokis la raporto de Dimităr Mutuŝev, ĝenerala direktoro de la mastrum-entreprenejoj ĉe BEA, kiu klarigis gravajn principojn en la laboro kaj organizado de tiuj entreprenoj. Interesa, riĉenhava kaj celkonforma estis la raporto de Angel Todorov, sekretario de BEA pri instruado kaj ĝenerala direktoro de IEK. Li faris konkretajn proponojn pri la estonta E-instruado, pri

interesigo de E-kursanoj al la laborprogramo de BEA kaj pri ilia varbado kiel regulaj membroj kaj aktivuloj. Specialan atenton al la agado de la sekcioj ĉe CO de BEA turnis ties vicprezidanto Petăr Todorov. Estis diskutataj (kvankam nesufiĉe) ankaŭ problemoj pri informado kaj propagando de Esperanto, pri kunlaborado al niaj E-periodaĵoj — unuavice al la asocia organo „Bulgara Esperantista“. D. Papazov detale konigis al la partoprenantoj la strukturon kaj la funkciadon de apartaj fakoj ĉe CO de BEA.

Dum libera diskutado oni traktis multajn interesajn problemojn tuŝitajn en la raporto kaj dividis valoran sperton.

La organizita seminario estas kuraĝiga kaj bonrezulta komenco, kiun postsekvos seminarioj kun aktivuloj el la distriktaj kaj societaj estraroj de Bulgara Esperantista Asocio por plua sukcesa evoluo de la E-movado en nia lando.

**D. P.**



# juna esperantisto

## INSTRU-PROBLEMOJ EL MIA VIDPUNKTO

Mia staĝo kiel E-liktoro estas ĉiam ankoraŭ malgranda. Nur kvar jarojn mi instruas la Internacian Lingvon. Sed jam dum la unua kurso, kiun mi gvidis, mi alfrontis iujn problemojn.

En niaj rondoj oni ofte parolas pri plijunigo de la E-movado. Sed per paroladoj kaj artikoloj tion oni ne povas realigi. Oni strebas variigi, pliriĉigi la diversspecajn formojn por propagando de Esperanto inter ĝejnulojn — ĝelernantojn kaj studentaro. Sed la vero estas tia, ke oni facile povas varbi kiun ajn por vizitado de kursoj. La malfacilaĵoj venas poste. Kion fari, kiel procedi?

Al ni E-liktoroj oni komisiis la taskon „finvarbi, finkonvinki kaj enviciĝi la venintojn en la E-movadon“. Kaj jen kio sekvas — la liktoro eniras la klason, la leciono komenciĝas. Dum la tuta tempo li (aŭ ŝi) strebas klarigi al la kursanoj kiom necesa por ili estas la lernado de la Lingvo Internacia. Ĉe malpli junaj homoj tio estas facila afero, ĉar ili jam serĉas ian novan ŝatokupon, ili deziras trovi novajn amikojn, alian medion, plivariigi sian vivmanieron. Foje (mi ne volas, ke la malpli junaj samideanoj ofendiĝu!) necesa estas nur afabla rideto de la instruisto, laŭda vorto pri la hejmtasko kaj ili eksentas novajn fortojn por lerni. Ili rapide eniras la movadan vivon, interesiĝas pri niaj aranĝoj kaj vizitadas ilin fervore (kvankam ne komprenante ties enhavon). Sufiĉas, ke ili kolektiĝas, paroletas Esperanton, vidas samkursanojn, interbabilas.

Sed ĉu same statas la afero ĉe junuloj? Imagu, ke vi estas studento. Vi havas multajn amikojn, la vivo ĉiam ankoraŭ aspektas rozkolora (escepte dum ekzamensio) kaj serĉas ion treege novan kaj interesan.

Bedaŭrinde la studkondiĉoj kaj la lernohelpiloj ĉiam ankoraŭ ne estas la plej bonaj kaj niaj penoj varbi niajn kursanojn por la E-movado ofte restas vanaj. . .

Mi ne estas pesimisto. Malgraŭ la malfacilaĵoj de ĉiuspeca karaktero, en niaj kursoj — por nia ĝojo — momente estas multaj junaj homoj. Eble, ĉar al la junuloj estas propra la impeto, la kuraĝo kaj ili ne timas malfacilaĵojn, sed emas batali kaj venki.

Ekstaras problemoj pri la instruisto. Oni ĉiam memoras ian unuan instruiston de la lernejo. La samo validas pri la E-instruisto. Ege gravas la personeco, la karaktero, eĉ la aspekto de la liktoro. Estas pli agrable kaj oni pli facile „maĉas“ la gramatikajn, se antaŭ vi staras juna, simpatia homo. Sed nur tio ne sufiĉas. Lastatempe oni rapide „produktas“ junajn E-liktorojn. Kaj kiam tiu „rapide kreskigita“ persono ekgvidas kurson, evidentiĝas, ke li mem ankoraŭ multon devas lerni. Do, ni zorgu krom pri kvanto, ankaŭ pri kvalito.

Laŭ mi, konvenaj formoj por altiri ĝejnulojn, partoprenantajn en niaj kursoj al la movada vivo estas organizo de „paroligaj rondoj“, rondoj pri korespondado, laŭ intereso. Kaj de tempo al tempo — ankaŭ diskoteko aŭ amuzprogramo estos bonvena. Ĉar nur lerni oni ne emas.

Konklude mi resumu: por varbi kaj altiri ĝejnulojn (kaj ne nur ilin!) al la movado, ni bezonas konvenajn klasĉambrojn, helpilojn, bonajn liktorojn, interesajn aranĝojn por komencantoj kaj. . . multan paciencon, zorgemon kaj komprenemon. La rezultoj ankaŭ ĉe la nun ekzistantaj kondiĉoj estas kontentigaj, do ni tamen strebu, postulu, laboru! Al ĉiuj samagaj kolegoj — sukceson!

Veneta BALEVA

## En la lando de lotusfloroj

(daŭrigo de n-ro 3/1986)

### ŜANDUNG

Ni adiaŭas la ĉefurbon kaj veturas suden al duoninsulo Ŝandung. La aŭtuna tago estas suna kaj varma.

Ŝandung estas la plej dense loĝata provinco. Sur teritorio de 150 000 km<sup>2</sup> loĝas ĉirkaŭ 60 milionoj da homoj!

Lu Gang legas el iu gvidlibro: duoninsulo Ŝandung estas la lulilo de la ĉina popolo. En prahistoria tempo tie ĉi loĝis nomadoj-paŝtistoj. Iom post iom ĉinoj koloniigis la duoninsulon kaj okupis sin pri agrokulturo, dank' al la akvoj de la Flava Rivero. Ĉi tie estas fondita la unua ĉina ŝtato.

Kiam la sekvantan matenon ni veturis al la Flava Rivero, mi petis mian akompananton klarigi, kial oni momas ĝin Flava.

— Hoang Ho oni nomas ĝin de prahistoria tempo. Ĝi estas nomata flava, ĉar kuntrenas grandajn amasojn da ŝlimo. Kromno-

mojn ĝi havas ankaŭ — „La plago de Ĉinio“, „Rivero de mil katastrofoj“ kaj „Popola skurĝo.“


Ni grimpis sur granitan rokon por vidi la digojn. Al ni aliĝis oficisto el la kontraŭinunda servo. Li diris:

— Ambaŭflanke de la rivero vi vidas rizkampojn kaj legomĝarde-

nojn. Ili ekzistas dank' al la digoj. En 1938, dum la intercivitana milito, generalo Ĉang Kaŝi ordonis, ke oni detruu la digojn. Tiam pereis pli ol unu miliono da homoj.

Ni petis lin plu rakonti pri Hoang Ho.

— La Flava Rivero estas malfacile bridebla. La digoj starigitaj por ŝirmi agrojn kaj homojn, estas longaj pli ol 700 kilometrojn. Ordinare la pluvegoj venas en julio kaj ĉesas en oktobro. Ofte la inun-



Grandega akvoellasa kluzo por bari Changjiang (Jangzi)-riveron

De la komenco de la lerno 1985/1986 pliaj 35 gelnantoj de 8-a „D“ klaso en 8-a Unueca Mezgrada Politeknika Lernejo „Vasil Levski“ en Sofio devige lernas Esperanton paralele kun la angla lingvo po 3 horojn semajne, kiel unua eksperimenta E-klaso dum la pasinta lerno.

Jam en septembro 1985 la E-gelnantoj el 8-a „D“ kaj 9-a „D“ klasoj ricevis vortarojn kaj lernolibrojn. Al la gejunuloj oni instruas laŭ kompleksa aktiva metodo kaj ĉiuj ili lernas Esperanton kun granda intereso. Ĉar laŭ ili ĝi estas facila kaj belsona, kun facila gramatiko kaj riĉa internacia leksiko. Krome, ili vidas en ĝi la lingvon de paco, amikeco kaj internaciaj rilatoj.

36 lernantoj el la eksperimenta klaso sukcese ekzamenigis pri unua grado kun noto „Tre bone“.

La 29-an de novembro okazis renkontiĝo de la E-lernantoj el ambaŭ klasoj kun la prezidanto de BEA Hristo Gorov — poeto-partizano, veterano de la bulgara esperantista movado. Ĉeestis ankaŭ d-rino Cveta Stamenova, prezidantino de la Urba Estraro de BEA, Marin Băcev — ĉefmetodikisto de BEA kaj la klasestroj. Kamarado Gorov rakontis pri sia partopreno en la batalo kontraŭ faŝismo kaj speciale pri la partizana movado en la distrikto de Plovdiv. La lernantoj promesis, ke ĝis la fino de sia lernado en la mezlernejo ili sukcese ekzamenigis pri tria grado kaj somere de la lasta jaro, en Pisanica, ili sukcese ekzamenigis pri instrurajto. Krome ili prezentis al k-do Gorov Alvokon al ĉiuj infanoj-esperantistoj en la mondo organizi fonduson por konstruo de esperantista sonorilo omaĝe al la movado „Standardo de la paco“. Ĉiuj E-lernantoj ricevis donace gramofondiskojn kun poemoj de Hristo Gorov, kun lia aŭtografio.

De la 2-a ĝis la 10-a de januaro 1986 la lernantoj el la unua eksperimenta E-klaso pasigis la vintrajn feriojn en Pisanica, kie ili ripozis kaj preparis sin por la Revuo de E-Parolo kaj Kanto en Razgrad. La dua E-klaso pasigos tie la printempajn feriojn.

Georgi DEJANOV,  
E-kursgvidanto en 8-a lernejo  
„Vasil Levski“ — Sofio

doj surprizas nin. Pro tio oni tag-nokte observas la nivelon de la rivero. La erozio grave malhelpas la batalon kontraŭ la inundoj. Sur sia longa vojo, kvin mil kilometrojn, ĝi erodas la argilgrundon kaj trenas ĝin orienten. Parto de la argilo amasiĝas en la riverlito, alia — en la delto. Pro tio la rivero ne estas profunda. El la argilo, kiun ĉiujare kunportas la rivero, oni povas konstrui digon altan unu metron. Kompare kun ĉiuj grandaj riveroj en la mondo, Hoang Ho estas la plej ŝlimhava. Unu kuba metro da akvo entenas 34 kilogramojn da ŝlimo.

Observante la baraktadon de la jonkoj, mi demandis, ĉu la navigado laŭ Hoang Ho estas danĝera.

— Jes, — respondis la oficisto, — la navigado estas malfacila kaj danĝeroplana, sed la jonkistoj ne timas la riveron. Ja ili naskiĝas en la jonkoj, tie ili laboras kiel boatistoj, pramistoj aŭ ŝarĝportistoj kaj mortas en la jonko. Same tion faris iliaj patroj, avoj kaj praaŭoj. . .

Mi malsupreniris de la roko kaj direktiĝis al jonko kun velo el

pajla mato. Dum la junaj jonkistoj malsarĝadis la boaton, maljunulo forigis internaĵojn de fiŝo nomata „Li“. La oficisto rakontis, ke kiam la fiŝo plenigas sian stomakon per ŝlimo, ĝi mortas kaj oni kaptas ĝin per speciala reto.

La maljuna jonkisto informis nin, ke ili transportas dudek tunojn da rizo.

— Al kiu vi liveras la rizon? — demandis mi.

— Al la ŝtata entrepreno. Ja la ŝtato distribuas la rizon, kaj tiu distribuado estas justa. Sen ĝi ekestos malsato, ĉar ankoraŭ ekzistas spekulantoj.

La oficisto aldonis:

— Ĉiujare la „buŝoj“, tio estas novenaskitoj, pliiĝas je dek-dekdu milionoj. . .

— Ĉu oni ne povas reguligi la naskokvanton?

— La ŝtato volas fari tion, sed la popolo sekvas la ordonojn de Budhismo, kiu malpermesas abortojn. . .

Post la Flava Rivero sekvis promenado preter la fama lago Daminho. La lago estas sufiĉe granda, ruĝkolora pro la lotusfloroj. Inter la vegetaĵoj mi vidis boatojn

La 2-an de februaro 1986 en la ĉefurba Faka Mezlernejo de Nutraĵindustrio kunvenis pli ol 60 instruistoj kaj oficistoj el la distrikto de Sofio — partoprenantoj en la foresta E-kurso, organizita de la Distrikta Estraro de BEA. Unufoje ĉiunokte la kursanoj renkontiĝas en la lernejo por klarigo de malfacilaj momentoj dum la preskaŭ memstara lernado de la lingvo.

Jam aŭtune oficistoj de DE de BEA renkontiĝis kun konvenaj personoj kaj entuziasmigis ilin pri lernado de la Internacia Lingvo. Fine de oktobro estis formitaj kvar grupoj — du de unua grado kaj po unu de dua kaj tria grado.

Malgraŭ ke la instruado estas foresta, la ĝisnunaj rezultoj estas bonaj dank' al la persista memstara laboro de la kursanoj. La pliparto de ili estas junuloj — eble la estontaj aktivuloj de la landa esperantista movado. Unu el la plej entuziasmaj novaj adeptoj de la Internacia Lingvo Emil Jankov (1-a grado, instruisto de pentroarto kaj laborinstruado en Pravec) dividas:

— Mi hazarde eksciis pri Esperanto, sed nun mi fervoras dum la lernado de la lingvo. Kun plezuro mi popularigos ĝin inter miaj lernantoj.

Jen la opinio pri la foresta kurso de Stoil Nikolov el Botevgrad, instruisto de franca lingvo:

— En la foresta kurso mi instruas Esperanton al la kursanoj de tria grado. Mi kredas, ke miaj kursanoj nepre instruos Esperanton en nia distrikto.

Post la decido de la Ministerio de Popola Klerigo pri fakultativa lernado de Esperanto en la mezlernejoj, baldaŭ evidentigis, ke ne sufiĉas spertaj E-instruistoj, precipe en la pli malgrandaj loĝlokoj. La tradiciaj E-kursoj en la Internacia Esperanto-Kursejo ne estas la nura vojo por solvo de tiu tre grava problemo. Tion pravas la bone organizita kurso en Sofia distrikto. Pro tio ni kredas, ke dum la sekvanta lernojaroj en multaj lernejoj en la distrikto eksonos la Esperantoparolo.

Atanas ILKOV

kaj en ili — knabinojn, kiuj ŝirko-  
lektis la larĝajn foliojn.

— Kial oni kolektas la foliojn, Lu Gang?

— La foliojn oni sekigas kaj uzas ilin anstataŭ pakpapiro, — klarigis mia akompananto. — La fruktoj estas manĝeblaj.

Apud la lago troviĝis historia muzeo. La muzeestro montris al ni bildojn de famaj pentristoj, diversajn statuojn de Budho kaj porste akcentis:

— En nia provinco Ŝandun estas naskita la granda ĉina filozofo, politikisto kaj edukisto Konfuceo (551–479 a. n. e.). Cefa temo de lia etiko estas la starigo de humana ordo. En la muzeo mi aŭdis la vivhistorion de Sun Zhiang, gvidanta la kampanan ribelon dum la dekdau jarcento.

Restante kelkan tempon en Zinan, la ĉefurbo de la provinco Ŝandung, ni promenis ĉe la „Sanktaj Fontoj“. El roko ŝprucis kristala akvo, en kiu naĝis grandaj „sanktaj“ karpoj. La akvo, laŭ la lokaj loĝantoj, estas netrinkebla, ĉar ĝi venas el la sankta Monto de Mil Budhoj.

## POR NIA LINGVA KULTURO

**INTERLINGVISTIKO — ESPERANTOLOGIO.** (kolekto de studoj kaj sciencaj kontribuajtoj). Kunmetis kaj redaktis Violin Oljanov, recenzis Friso Gorov, p. 252, formato 20×15, eldonkanto 1 000 ekz., prezo 2,05 lv., BEA, Sofio. Havebla ĉe la libroservo de BEA.

Jen libro, kian la bulgara esperantistaro delonge atendis. Dum la lastaj 15—20 jaroj pli kaj pli ofte, sur la paĝoj de libroj kaj revuoj, aperadas la terminoj „Interlingvistiko“ kaj „Esperantologio“. Bedaŭrinde, tre malmultaj estas la esperantistoj, kiuj pli-malpli konas tiujn novajn sciencojn. La ĉefa kaŭzo por la stagno de la esperantologia penso en nia lando estas la manko de koncerna literaturo. En eksterlando aperis ne malmulte da libroj, artikoloj en revuoj, prelegoj en simpozioj kaj seminarioj k. s., sed nur malmultaj bulgaraj esperantistoj sukcesis havigi al si tiujn librojn aŭ partopreni en tiuj simpozioj. Sola fonto de esperantologiaj informoj en nia lando estas la artikoloj en „Filologo“ kaj de tempo al tempo apartaj artikoloj en „Paco“, „Bulgara Esperantisto“ kaj „Sciencia Mondo“. Sed tio tute ne sufiĉas kaj la bezono pri similaj verkoj estas akre sentata.

Al tiu akra bezono respondis la konata bulgara esperantologo Violin Oljanov. La kunmetita de li libro estas vere historia evento por nia Esperanto-movado.

La libro estas kolekto de 26 kontribuajtoj pri lingvistikaj kaj esperantologiaj temoj. Aŭtoroj estas 15 plej elstaraj esperantologoj el 7 landoj. Inter ili, kvin membroj de la Akademio de Esperanto (inkluzive ties prezidanto kaj du vicprezidantojn). Tio jam destinas la altan valoron de la libro, kiu kontribuas por plialtigo de la lingva kulturo de nia esperantistaro.

La materialo en la volumo estas ordigita laŭteme. En la antaŭ-parolo la kunmetinto prezentas al la legantoj sufiĉe klaran bildon de la nuntempa stato de la esperantologia penso en nia lando kaj klarigas, kio lin instigis kunmeti la libron.

La unua artikolo estas de la eminenta bulgara filologo Atanas D. Atanasov (ADA). En ĝi estas detalaj difinoj de la terminoj „Interlingvistiko“ kaj „Esperantologio“, klarigoj pri la studobjektoj de tiuj du sciencoj, ties proksimeco kaj la diferencoj inter ili. La saman temon pritraktas alia bulgara filologo — Maserov.

En sia artikolo „Lingvistika utopiismo“ akademiano prof. Stojan Guĝev donas detale argumentitan respondon al la demando kiuj estas veraj utopiistoj: ĉu la esperantistoj, kiuj nun klopodas por tutmonda disvastigo kaj uzado de Esperanto — jam preta kaj reale vivanta lingvo, aŭ ĝiaj kritikantoj, kiuj atendas la naskiĝon (en nedifinita fora estonto) de „maksimume perfekta“ modelo de internacia lingvo.

Violin Oljanov dediĉas 20 paĝojn al recenzo kaj kritikaj notoj pri mankoj, malperfektaĵoj kaj preterlasoj en „Plena Analiza Gramatiko“.

Tre detalan artikolon pri la difina artikolo „la“ kaj ĝia uzo prezentas A. Vaitilavičius.

Sur 36 paĝoj la prezidanto de la Akademio de Esperanto d-ro A. Albault prezentas sian reviziitan kaj korektitan verkon „Kontribuo al la Esperanta toponimiko“.

La germana esperantologo d-ro Detlev Blanke faras konfrontan komparon de Esperanto kaj la germana lingvo.

La ceteraj artikoloj temas pri specialaj leksikologiaj kaj gramatikaj problemoj: a) Influo de la slavaj lingvoj sur Esperanton; b) Litovaĵoj en Esperanto; c) Deveno de la sufiksoj „-ul“, „-il“ kaj de la prepozicio „al“; d) Uzo de la sufikso „-in“; e) Uzo de la prepozicioj „de“ kaj „per“ kun pasivaj participoj, k. a.

Ne estas eble ĉi tie profunde kaj kritike diskuti la unuopajn kontribuajtojn. Miaj notoj havas nuran celon informi pri la karaktero kaj la enhavo de la libro.

Zorge presita, sur bona papero, fidine bindita, kun plaĉa ekstero, sendube la volumo okupos dignan lokon inter la grandaj lingvistikaj antologioj.

Neno JANEV

Mi esprimis la deziron vidi tiun ĉi „sanktan“ monton de proksime.

— Bone, — respondis Lu Gang, — vi havos la okazon vidi kiel amuziĝas la loĝantaro de la urbo.

Ĉe la piedoj de la monto situas monaĥejo de Budho. En la ĉirkaŭaĵo svarmis homamaso. Inter la amaso promenis stratvendistoj kaj proponis orangojn, bananojn, mandarinetojn, pomojn, granatojn, ribojn. Tondris tamburoj kaj gongoj. Sur kelkaj podioj oni spektis popolajn ludojn: „Danco de leonoj“, „Danco kun rubandoj“, „Danco de drakoj“.

La fabelaj leonoj estis faritaj el bunta kotona aŭ silka ŝtofo. Paro da leonoj kaj kelkaj leonidoj defendis sin kontraŭ junuloj, kiuj incitis ilin. Mi demandis mian akompananton, kiom da homoj kaŝas sin en la interno de ĉiu „leono“.

— En ĉiu leono estas nur paro da junuloj, — respondis Lu Gang kaj direktis mian atenton al giganta drako.

Ĝin portis per bambuaj fostoj dek unu dancistoj. En la diafana korpego lumis kandeloj.

— Lu Gang, kion simbolas la drako?

— En la pasinteco oni petis pluvon de la ĉielo, kiam longa sekeco neniigis la grenon. Per tiu ĉi aktiva ludo nun oni agitas por reguligo de la stratmovado, de la trafiko. Sur niaj stratoj ofte regas kaoso, ĝin kaŭzas la biciklistoj kaj rikiŝoj.

Vesperigis. La lumoj en la korpo de la drako brilis, dum la fabela monstro zigzagis, serpentumis, kuŝiĝis, denove suprenleviĝis kaj faŭkis per la grandega buŝaĉo.

## ŜENHI

Nia rondvojaĝo daŭras preter kultivata montdeklivo kaj preter kavernoj, fositaj en argiltavoloj.

— Ho, kiom multe da argilo! — miris mi. — Kiamaniere ĝi amasiĝis tie ĉi?

— Ĝustan respondon oni ne ricevas de la sciencistoj. Iuj supozas, ke la tavoloj estas alblovitaj de la dezerto Gobio, aliaj kredas, ke la tavoloj konsistas el demetaĵoj, kiujn dum miljaroj formis la riveroj.

Mia rigardo alkroĉiĝis al multetaĝaj kavernoj. En supraj etaĝoj loĝas homoj, en malsupraj — bestoj. Sur la placo antaŭ la kavernoj oni draŝas rizspikojn.

— Dum la intercivitana milito — mi aŭdis la voĉon de Lu Gang, kiu enrigardis en kaverton-muelejon, — en similaj kavernoj loĝis ruĝarmeoj kaj revolucigvidantoj.

Ni aliris vilaĝanon, kiu flikis sian tenisŝuon. Mi lin demandis, ĉu estas higieno loĝi en kavernoj?

— Jes, kial ne, — respondis la kavernohomo. — Vintre en kabano estas malvarme, somere — varme, jen pro kio mi preferas loĝi en kaverno. Ni, vilaĝanoj estas alkutimigintaj al tia vivo, kiel la ĵonkistoj estas alkutimigintaj loĝi en la ĵonkoj. Tiel oni ŝparas la grundon.

Lu Gang aldonis:

— Sparado en tiu senco, ke super iliaj kavernoj troviĝas la agroj, oni produktas grenon, rizon.

Laŭ aserto de mia akompananto, provinco Ŝenhi estas ankaŭ lulilo de la ĉina gento. Ĉi tie estas metita la fundamento de la ĉina kulturo.



**CANKO MURGIN. Progresemaj momentoj en la ideologio de L. L. Zamenhof (Kolekto de studoj), Ofsetpreĝejo de BEA, Sofio, 1985. 66 p. Eldonkvanto—1000 ekz. Prezo: 0,67 lv. Acetebila ĉe BEA.**

Ĉiuj, kiuj atente legis la revuojn „Paco“ kaj „Bulgara Esperantisto“ dum la jaroj 1980—1984, nepre rememoros la publikigitajn en ili tre interesajn studojn de Canko Murgin pri la ideologio de L. L. Zamenhof. Nun, prezentitaj en kolekto kaj ordigitaj laŭ kronologia principo, ili farigas unu tuto, kiu plejdas por komuna celo: kiel disvolviĝis kaj perfektigis la mondkoncepto de nia Majstro.

La unua artikolo estas dediĉita al la ideo pri starigo de planlingvo en la sfero de internaciaj kaj interŝtataj rilatoj, al diversaj projektoj de internacia lingvo kaj al la komencaj jaroj de Esperanto.

Apartan intereson prezentas la artikolo „L. L. Zamenhof“ pri la interna ideo de esperantismo<sup>1</sup>, kie C. Murgin parolas pri unu el la esencaj komponantoj en la tradicia ideologia arsenalo de Zamenhof — la tiel nomata „Interna ideo“ de esperantismo. Kio ĝi estas, de kie ĝi venas kaj kiaj estas ĝiaj funkcioj kaj destino?

C. Murgin provas malfermi fenestron al preskaŭ nekonataj aspektoj de la Esperanto-movado bazante siajn asertojn sur la korespondado de nia Majstro, kio donas al li motivaĵon konkludi, ke ekde 1904 Zamenhof agas „sub la radioj de marksismo“. Ĉe Zamenhof, substrekas la aŭtoro, aperis tute novaj pensoj pri batalo kontraŭ imperiismo kaj militarismo, por starigo de paco kaj socialismo. Ĉu li sukcesos jungi tiujn novajn ideojn en servo de siaj klopodoj por perfektigo de la mondo aŭ revenos al la pacifisma kamero obskura?

En alia artikolo — „Pensiga momento en la poezio de D-ro L. L. Zamenhof“ — C. Murgin analizas la poemon „Preĝo sub la Verda Standardo“ kaj la Zamenhofan kongresparoladon antaŭ la Dua Universala Kongreso de Esperanto en Genevo (1906) por argumenti sian opinion, ke en nia Majstro aperis ĝermo de tute nova koncepto pri la mondo.

En sia verkaro Zamenhof plurfoje eksplikas, ke la

internacilingva problemoj estas nur parto de la granda afero por perfektigo de la homaro. Krom tio li konstatis, ke por ili (por Esperanto kaj por perfektigo de la mondo) oni devas labori agadi samtempe, paralele. C. Murgin dediĉas al tiu klopodo de Zamenhof apartan studon, en kiu la leganto trovos profundan analizon de multaj Zamenhofaj tekstoj kaj speciale de kvin frazoj el lia sociplatformo.

„L. L. Zamenhof dum la revoluciprepara periodo (1910—1914)“ estas la titolo de la sekva artikolo, en kiu C. Murgin parolas pri la pozitiva rilato de la aŭtoro de la Lingvo Internacia al la organizita laborista Esperanto-movado, pri lia forta espero, ke li ricevos de la laborista klaso ne nur subtenon por Esperanto, sed ankaŭ komprenon, konsenton kaj simpatian por la pacideo, por la ideo pri frateco inter la nacioj kaj ŝtatoj.

La subita morto de Zamenhof en aprilo 1917 ĉesigis lian ideologian disvolvon. Por akiri pliajn argumentojn pri kvalifiko de la nova tendenco de Zamenhof C. Murgin decidas esplori tiun proceson ĉe liaj fidelaj kamaradoj kaj kunlaborantoj kaj en la lasta artikolo prezentas la rezultojn pri kelkaj el tiuj esploroj.

Ĉiuj studoj abundas je solidaj faktoj kaj dokumentoj kaj pro tio la konkludoj estas rezulto de profunda scienca esploro. La vivo kaj la agado de Zamenhof kaj speciale la nova tendenco en lia mondkoncepto, pri kiu fieras nun la aktivaj esperantistaj pacdefendantoj, estas pritraktitaj en la konteksto de la grandaj historiaj eventoj, kio ebligas la legantojn pli bone kompreni la disvolvon de nia Majstro. La lingvo estas riĉa kaj vigla, la stilo — tre ofte polemika, kaj pro tio la studoj kaptas la atenton eĉ de tiuj, kiuj ne interesiĝas pri sciencaj kaj historiaj legaĵoj.

En la antaŭparolo Canko Murgin skribas, ke la personeco de Zamenhof daŭre estos objekto de studoj, esplorado kaj reaprezado jen pro bezonoj de novaj generacioj, jen pro reveno al ignoritaj faktoj aŭ pro malkovro de novaj dokumentoj. Liaj studoj estas grava kontribuo al la scienco kaj pro tio ili estas solida bazo por estontaj esploroj super la progresemaj momentoj en la ideologio de la genia aŭtoro de Esperanto.

Venelin MITEV



Pekino: „Templo de l'ĉielo“, konstruita en XV jarcento

ro. Pri tio ni konvinkigis en la subĉiela muzeo. Tie ni vidis antikvajn monumentojn, ŝtonajn tabelojn kun diversaj tekstoj, postrestaĵojn de loĝejoj, potoj, teleroj, kruĉoj, iloj de diversaj epokoj.

La ĉefurbo de la provinco Ŝjien estas fama ankaŭ per sia pagodo „La granda templo de la sovaĝaj

anseroj“. Ĝi estas konstruita en la sepa jarcento.

Maljuna, kaduka lamao kondukis nin en la internon de la pagodo. Ĝi estas sesetaĝa, ĉar laŭ la instruo de Budho, ankaŭ la ĉielo estas sesetaĝa. La lamao asertis, ke li estas vera Budho. Mi petis lin rakonti, kiel oni farigas vera Budho.

— Tiu, kiu decidis enkorpiĝi en Budho, devas fasti kaj preĝi dum ses jaroj. Ĉiujare mi supreniris unu etaĝon kaj nun mi restas en la sesa etaĝo, pro tio mi estas vera Budho<sup>1</sup>.

Vizitinda estas ankaŭ la arkeologia muzeo. Tie oni vidas tabelojn el nigraj ŝtonoj, sur kiuj estas gravuritaj antikvaj tekstoj. Ĉiu tabelo sidas sur ŝtona testudo. La imperiestro Tang Zhou eternigis eĉ siajn ĉevalojn. Ĉiu besto distingiĝas per sia karakterata gracia pozo.

La direktoro de la muzeo atentigis nin pri la reliefo „La blanka tigro“. La skulptita sovaĝa besto aspektas tre sangavida, precipe ĝiaj buŝego kaj piedegoj.

En la sama provinco ni vizitis ankaŭ la muzeon de Song-dinastio (960—1127). Ĉiu tombodomo havas du ejojn — en unu kuŝas la sarkofago, la alia servas por ceremonioj.

Ni haltis antaŭ „La aleo de spirito“. Dekdu ŝtonfiguroj de antikvaj militistoj — la sekvantaro de la dinastiestro. Ili kvazaŭ gardas la tombon de la imperiestro. Krom la homfiguroj, la tombodomon gardas ankaŭ ŝtonleonoj kaj virbovoj.

La antikva arto okupiĝis ĉefe pri regnestroj kaj budhoj, sed ankaŭ pri la vivo de la popolo — plugado, semado, ĉasado.

<sup>1</sup>Budho — 1. Alnomo de Sidarto Gotamo, fondinto de la budhismo. 2. Alnomo de homo atinginta la plej supran gradon de sciado kaj klarvidado pri la iluzio de ĉia memo.

HO MO GO  
(Daŭrigota)

## OPTIMISMA TRAGEDIO

Julian Modest, „Ni vivos!“ Dokumenta dramo pri Lidia Zamenhof. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio. Redaktis: Vilmos Benczik. Postparolo: Imre Péthes. Budapeŝto, 1983 Elĉerpita. Eventuala dua eldono eblas.

Legante tiun ĉi dokumentan dramon, mi rememoris la konsilon de Leo Tolstoj, ke dramo — anstataŭ rakonti la tutan vivon de la homo, devas meti lin en tian situacion, devas havi tian intrigon, ke, malnodigante ĝin, la aŭtoro malkovru lian tutan vivon.

Julian Modest ne rakontas la tutan vivon de Lidia Zamenhof, lia dokumenta dramo temas nur pri la lastaj jaroj de ŝia vivo. Sed fininte la legadon, mi havis la impreson, ke antaŭ miaj okuloj trapasis ŝia tuta vivo.

La filino de Zamenhof staras antaŭ ni kun ĉiuj siaj plej karakterizaj trajtoj — delikateco, laboremo, boneco, inteligenteco, ideo konvinkiteco. (Kvankam ŝi havas eblecon sin savi, tamen ŝi ĝis la lasta minuto persistas ĉe sia parencaĵo).

Kio altiras nian atenton jam de la unua akto de la dramo? Tio ĉi estas la sento pri vero kaj objektiveco; tio ĉi estas la honesta, matura kaj profunda opinio de la aŭtoro pri la vivo, la homo, la herooj kaj la eventoj; tio ĉi estas la serioza kaj nespekulacia rilato al la historio kaj al la vorto. Ni bone scias, ke plej facile oni spekulacias pri la historia temo, ke tre ofte la fantazio, kvazaŭ pro neceso, ekfuriozas jen en romantikaj rakontoj, jen en filozofiaj modernigaĵoj. Julian Modest alpaŝas al la historio tre serioze kaj respondece — kiel al vero, kiun oni devas malkovri kaj elsuferi, por ke ĝi revivigu denove per la arto kaj atingu ankaŭ la nuntempulojn.

La soĉistoria fono, kiun la aŭtoro kreas, estas densa kaj aŭtentika. Ĉar li bone konas ne nur la dokumentojn kaj la faktojn; li sukcesas fari ion multfoje pli gravan — rekrei la etoson de la epoko, prezenti unu el la sennombraj teruraĵoj okazintaj en Eŭropo dum la Dua Mondmilito rezulte de la faŝisma invado. Ni vere sentas la suferojn, la senpovon de la rolantoj kaj ni sentas, ke konsciante sian senkulpecon, ili devas barakti inter espero kaj senespereco pri la transvivo. Unu el la simboloj en la dramo estas la fondita en novembro 1940 en Varsovio getto: ĝi estas en preskaŭ ĉiu sceno: aŭ ĝi formas unu el la muroj de la loĝejo, aŭ unu el la muroj de la drinkejo en la oka akto, aŭ en ĉiu ago videblas ĝia nigra ombro, simila al grandega kaj terura aglo.

Julian Modest verkas en la spirito de la plej bonaj tradicioj de la monda dramaturgio. Ĉe li mankas la streĉoj de iuj nuntempaj verkistoj krei „originalan“ dramon kun nediveneblaj metaforoj kaj provokanta esprimpovo.

La sekreto de ĉiu bona dramo estas en la du ordonoj: ne devojiĝi de la ĉefaĵo kaj mallongigi ĉion, kion oni povus eljeti. La dialogo en la dramo de Julian Modest estas konciza, streĉa, la ago disvolviĝas kun kinematografia rapideco, mankas superfluaĵ replikoj kaj situacioj.

La verko de Julian Modest estas tre aktuala nun, kiam pli forte ol ĉiam staras antaŭ la homaro la demando: paco aŭ nuklea katastrofo? D-ro Imre Péthes pravas skribante en la postparolo, ke en la nuna tempo la popoloj ĉiam pli forte sopiras al reciproka fido kaj interkompreniĝo.

Ĝiu tragedio, se ĝi respondas al sia nomo, faras optimisman impreson, diris Jochannes Becker. Julian Modest titolis sian dokumentan dramon „Ni vivos!“ Kiam en la fina akto kelkaj germanaj soldatoj eniras la ĉambron de Lidia kaj direktas pafilojn al ŝi kaj al ŝia fratino Sofia, Lidia per mallauĉa voĉo parolas al la publiko: „Eble la morto ne estas tiel terura. Ni mortas, sed novaj homoj venas. Ili ne forgesu pri la forto kaj la volo, per kiuj ni laboris, kredis, vivis.“

Venelin MITEV

## Novaj libroj

La kooperativoj kaj la junularo. Broŝuro. Tradukis kaj redaktis Georgi Dolapĉiev. Eld: Centra Kooperativa Unuiĝo. 1985. Formato 14×20 cm., P. 26. Senpaga. Havebla ĉe la libroservo de BEA.

La kunlaboro inter la kooperativoj en diversaj landoj kaj la Esperanto-movado estas tre vasta kaj multaspekta. La 27–30-an de septembro 1985 en urbo Plovdiv okazis la Tria Kooperativa Esperantista Konferenco, en kiu partoprenis kooperativanoj-esperantistoj el multaj landoj. La materialo de la Konferenco aperis en la broŝuro „La kooperativoj kaj la junularo“. Ĝi enhavas la interesan kaj detalan raporton de Milan Milanov — ĝenerala sekretario de la Centra Kooperativa Unuiĝo, la salutparoladon de Ivan Prâmov — prezidanto de la Centra Kooperativa Unuiĝo kaj la alparolon de d-ro Jozsef Pál — ĝenerala sekretario de la Konsilantaro de Hungaraj Kooperativoj. La broŝuro estas interesa ne nur por la esperantistoj-kooperativanoj, sed por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la problemoj rilate la aplikon de Esperanto en la laboro de la kooperativoj.

G. M.

## LASTE APERIS

En la fino de 1985 aperis la naciaj numeroj de „PACO“ — serio „B“. Unue, kiel kutime, alvenis la ĉefa eldono. Ties redaktoro — ing. Margit Turková, denove preparis por la legantoj interesan kaj belan revuon. En ĝi oni povas legi raportojn pri la VII Renkontiĝo de Pacdefendantoj en Pardubice, artikolon pri la historio de komenco de la Dua Mondmilito (de Adolf Staňura), jubilean paĝon pri aktorino Eva Seemannová okaze de ŝia 60-jariĝo, pensojn de poeto Jiří Karen pri la poezio, pri si mem kaj... pri William Auld, pro lia 60-jara jubileo, versaĵojn, recenzojn, humuraĵojn. Pere de multaj fotoj la junaj esperantistoj ekkonos la belegan mondon de ludiloj de Jarmila Jeřabková, pri kiu skribas Milan Labašta.

En la komenco de 1986 aperis ankaŭ la eldono de „PACO“ el GDR. Ĉi-numeron redaktis d-ro Detlev Blanke. Ĝia enhavo estas iom pli internacia ol tiu de la ĉefa eldono. Enestas porpacaj kaj sciencaj artikoloj, recenzoj, artikolo pri Johann Sebastian Bach omaĝe al la 300-a datreveno de lia naskiĝo, interesa kontribuado de Fritz Wollenberg pri Zamenhof. Menciinde estas, ke ĉiam en la nacia numero de GDR aperas kontribuadoj de nia samlandano Canko Murgin. Ĉi-foje li sin prezentas per du versaĵoj: „La minaco kontraŭ monda paco“ kaj „La perlo homara“.

Numero 4/85 de „INTERNACIA JURNALISTO“ (aperinta komence de januaro) certe meritas laŭdajn vortojn. Ĝia aspekto jam ege libeliĝis kaj la enhavo estas, kiel ordinare, interesa kaj aktuala.

Gravan lokon okupas la materialoj pri la 25-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Sofio, intervjuo kun Tibor Sekelj, rezolucio de UNESKO pri Esperanto. Kaptas la atenton artikolo pri la Unua Internacia ILEF-festivalo „Carma Rodopi-montaro“, okazinta en IEK — Pisanica, Bulgario. Agrabla surprizo estas, ke ĉi-foje granda parto de la revuo „apartenas“ al junaj kunlaborantoj. Per materialoj partoprenas Maria Jankova-Bojaĝieva, Veneta Baleva, Mariana Elenova, Georgi Mihalkov kaj Evgeni Georgiev. Ni gratulu la ĉefredaktoron pro la bona ideo instigi junajn homojn al kunlaboro kaj ni kredu, ke „I. J.“ daŭrigos tiun ĉi tendencon — doni pli da spaco al gejunuloj.

V. B.



# ĤRISTO GOROV TRI MILITOJ . . .

*Dediĉita al la Jaro de Paco*

Tri militojn mi travivis efektive,  
tri militoj nur en unu homa vivo. . .

1913

La balkanaj montoj kunpuŝigis grave,  
sangon verŝis serboj kaj bulgaroj brave;  
intervenis trans Danubo la rumanoj,  
grekoj el la sudo, hordoj de l'sultano,  
dum ni kompatindaj infanetoj orfaj  
devis fuĝi el vilaĝo en la nokto.  
Kun stomakoj ŝveligintaj pro malsato  
en malvarma vintro frostis en barakoj.

1914

Mondmilito! Inter Centraj imperioj  
kaj Entento de Britio kaj Francio.  
Ambaŭ fortoj strebis regi sur Balkanoj  
kaj denove sangis serboj kaj bulgaroj.  
Tondris la kanonoj super la vilaĝojn  
kaj aeroplanoj bombis sangan kaĉon.  
Do denove fuĝis junaj kaj maljunaj,  
serĉis savon en arbaro peĉmalluma.  
Jarojn daŭris la milit' imperiista.  
Elĉerpigis lastaj fortoj por rezisto.  
El sudfronto oni vokis: „Kamaradoj,  
al Sofio! Punu reĝon Ferdinandon!“  
Ni, geknaboj, gapis al la vagonaroj  
plenŝtopitaj de ribelaj viroj bravaj,  
kiuj verve kantis „La Internaciano“,  
ŝvingis ruĝajn flagojn de l'revolucio. . .  
Baldaŭ estingigis la ribela sento —  
landon enkatenis trupoj de l'Entento.  
Kaj denove sur la trono forĝis leĝojn  
caro Boris, fil' de l'forpelita reĝo!

1941

Dudek jaroj pasis, kaj al la Balkanoj  
marŝis kirasita trup' de hitleranoj.  
Ĉie, kie pasis, tretis la popolon,  
rabis ercon, grenon, fruktojn kaj petrolon.  
De Danubo blua ĝis Egea Maro  
regis la svastiko tutan la Balkanon.

SLAV ĤRISTOV KARASLAVOV

## KOMUNISTOJ

Sur ŝtono ni dormis  
en ŝton' masonitaj,  
la kuglo eniris  
la tombon  
kun ni.  
La lasta panpec'  
inter ni dividita  
la kredon kaj firmon  
kreskigis  
nur pli!  
Sur nia voj'  
ni ne per preĝoj  
kaj ne oriflamojn  
flirtigis

la vent'.  
Kun Internacio  
pafitaj  
ni falis,  
dum koroj  
batalis  
ĝis lasta  
moment'.  
Ĉu ĉio ĝis tie ĉi? . . .  
Nel Sen espero  
la revo ripozus  
sen flug',  
sen impet'  
Nun kantas  
de nia potenco  
la Tero,

enflugas  
la Kosmon  
raket'  
post raket'!  
Hodiaŭ,  
hierau kaj morgaŭ,  
kaj ĉiam  
la spuron desegnas  
la ruĝa  
aŭror.'  
Ni vojon trankvilan  
ekiros  
neniam,  
ĉar brilas  
la stel' komunisma  
en kor'!

*Tradukis: Nikoĵa Uzunov*

Hitler hurlis: „Ni bezonas vivospacon!“  
Kontraŭ Soveti' ordonis li atakon.  
Nia land' estigis de l'agreso bazo,  
por Krimeon bombi ĝis la mont' Kaŭkazo. . .  
Jen respondo al nazia ofensivo:  
levis sin popoloj savi propran vivon,  
grekoj kaj albanoj, fratoj jugoslavaj  
kaptis la armilojn kaj batalis brave.  
En Rodop'-montaro de Orfe' legenda  
ankaŭ mi aliĝis al geril' defenda.  
Same en Mezmonta, Rilo kaj Pirino  
luktis gerilanoj, iuj kun edzinoj.  
Kiam la soldatoj de martel' kaj serpo  
marŝis al Danuba borbo — barometro  
montris uraganon kaj fabrikaj tuboj  
al ribelo vokis sude de Danubo. . .  
Kaj ekspiris la homar' en sin' de l'paco —  
sen milito, sen avido je vivspaco.  
En Helsinki oni ĵuris plej solene  
solvi la problemojn en interkompreno.

1981

Nun pentagonanoj planas „limigitan“  
por ni — eŭropanoj la atom-militon.  
Ili havas sperton — bombis Hiroŝimon,  
bombis Nagasaki — faris monstran krimon!  
Nun la prezidento en la Blanka Domo  
revas el la kosmo regi super Globo!  
Kiom longe ni hezitis, homaranoj?  
Ĝis la Ter' ekkonvulsios en la flamoj?  
Gardu ni la pacon sur Planed' unika!  
Ŝiru mortigilon el la manoj krimaj!  
Restu nia Ter' kun maroj kaj riveroj,  
kun arbaroj verdaj kaj kristal-aero.  
Ne permesu ni eksplodon de la Kvara,  
ĉar ĝi estos lasta por la gent' homara;  
nia Glob' similos al la morta luno,  
al Venuso fajra kaj al Mars', Saturno . . .  
Karaj fratoj, ne similu ni Ŝlemilon,  
ŝiru do kuraĝe l' atom-mortigilon!

1985/1986

Ŝlemilo — homo sen sprito kaj ruĝo, kiu paciencie  
suferas sian misfortulon





# distroj

## Anekdotoj

### LA BLINDA PROFESORO

La profesoro pri matematiko en universitato de Kembrigo Zinderman estis blinda. Foje oni prezentis al li junan virinon. Post mallonga interparolo, li emociis diri:

— Ho, kiel belaj estas viaj dentoj!

La virino efektive havis belajn dentojn, tial iu apudstaranto demandis la profesoron kiel li komprenis, ke ŝiaj dentoj estas belaj.

— Mi ne havis embarason — respondis la profesoro. — Tiel senkaŭze ridas nur homo, kiu deziras montri siajn belajn dentojn.

### INTER AMIKOJ

— Kuracisto severe malpermesas al mia edzino okupigi pri kuirado. . .

— Ĉu via edzino malsanas?

— Ne, mi malsanas. . .

### ĈU MURDISTO?

Homo tre rapide kuras preter Sokrato (Sokrates). Li estas persekutata de armita viro.

„Haltigu lin! Haltigu lin!“ krias la armito. Sed la instruisto de Platono ne faras tion.

„Ĉu vi estas surda? Kial vi ne baris la vojon al tiu murdisto?“

„Murdisto? Kio estas tio?“

„Kia demando! Murdisto estas homo, kiu mortigas.“

„Aha, do buĉisto.“

„Vi malsaĝulo — mi opinias: homo, kiu mortigas alian homon.“

„Ho tiel, — do, soldato.“

„Stulta kapo!“ — Homo, kiu mortigas alian homon dum paco!“

„Ej, mi komprenas: la ekzekutisto.“

„Vi azeno! — Homo, kiu mortigas alian homon en lia domo!“

„Ho, nun mi estas certa: kuracisto!“

Tiam la armito blasfemante kuregis plu.

### MIRIGAJ NOMBROJ PRI LA HOMA KORPO

● Nia korpo estas konstruaĵo el 30 bilionoj da ĉeloj, kiuj atingas agon de nur kvar jaroj kaj sekve ĉiam devas esti anstataŭigataj. Do en homo de l'jaro 1986 jam ne estas eĉ ereto de tiu homo, kiu vivis en 1982; li estas tute renovigita.

● En la kvin litroj da sango, kiujn la korpo de plenkreskulo enhavas, troviĝas ĉirkaŭ 25 bilionoj da blankaj kaj ruĝaj sangoglobetoj. Kvankam ilia diametro estas nur 0,007 mm, pro sia granda nombro ili kovrus — metitaj unu apud la alian — areon de 2500 kvadratmetroj; kaj se oni ordigus ilin laŭ linio, tiu linio havus longon de pli ol la kvaroblo de la ekvatoro. Ĉiu el tiuj globetoj vivas nur ĉirkaŭ 20 tagojn; tiam ĝi estas eluzita kaj (en la lino) detruata, dum la sama nombro estas nove fabrikata en la ostomedolo, 6—10 milionoj en ĉiu sekundo, do 500—600 miliardoj en unu tago!

● La vojo de sangoglobeto el la koro al iu par to de la korpo (ni diru: al la piedo), returne al la koro, al la pulmoj kaj ree al la koro daŭras 23 sekundojn. Dum 24 horoj la sango sekve cirkulas 3000—4000 fojojn tra la arterioj kaj vejnoj.

● La koro, tiu kava, pugnogranda muskolo, pezanta 300 g, estas la plej ekonomie laboranta el ĉiuj motoroj. Ĝiaj du kameroj pumpas dum 24 horoj pli ol 100 hektolitrojn da sango en la korpon, kio egalas efikon de 20 000 kg./m. Sama energio sufiĉas, por levi lifton kun tri personoj ĝis la 30-a etaĝo. Moderna lokomotivo redonas en formo de laboro 10—15% de la energio, kiun oni donas al ĝi en formo de karbo; la benzinatoro redonas 20%, sed la koro 25—30%. Ses pecetoj da sukero enhavas proksimume la energion, kiun la koro postulas por sia ĉiutaga laboro. Kaj ĝi funkcias tage kaj nokte, sen halto, sen riparoj, 60 aŭ 70 jarojn aŭ pli longe — kiu motoro kapablas tio.?

### LA LASTA FRAZO DE ZAMENHOF

MIELO — AKSELO — MANTILLO — BOSKETO — MEBLARO — EMOCIO — PRESARTO — NEEBLO — INSTALO — ROSMARO — KORKLAPO — HEROO

El ĉiu el tiuj 12 vortoj prenu tri sinsekvajn literojn, kunigitaj ili donas la tekston de la lasta frazo, kiun D-ro Zamenhof skribis kaj kiun oni trovis kiel fragmenton de komencita artikolo krajone notita sur lia skribotablo.

### ĈU VI ESTAS OBSERVEMAJ?



Inter la unua kaj la dua pentraĵo estas dek diferencoj. Ĉu vi ilin malkovris?



## ESPERANTO EN BULGARA TELEVIDO

„La tempo finiĝas“ — avertas esperantlingve bela virino. Tiel la 7-an de marto ĉi-jare komenciĝis la amuzkonkurso de Bulgara Televido (BT) „Ne estas tempo“. Ĉi-foje ĝia kunorganizanto estis Bulgara Esperantista Asocio. La elsendo estis direktita al la vasta ne-esperantista publiko. En daŭro de unu ĥoro ĝi estis abunde informita pri la bulgara kaj internacia E-movado kaj ankaŭ ĝuis Esperantan parolon.

Kiel oficiala gasto la spektaklon ĉeestis Dimităr Papazov — ĝenerala sekretario de BEA. Partoprenis la bone konataj E-aktoroj Luna Davidova kaj Veselin Damjanov, kiuj deklamis kaj kantis en Esperanto kaj lernantoj el la Esperanto-klasoj en 8-a Sofia lernejo, kiuj respondis al demandoj pri Esperanto.

La elsendon preparis Sofia Esperanto-Domo de Kulturo (SEDK) ĉe BEA, laŭ ideo lanĉita de Bojidar Aleksiev — instruktore en SEDK. Post anticipa intertraktado kun fakuloj el Bulgara Televido la temoj „Esperanto“ kaj „BEA — celoj kaj agado“ estis inkluzivitaj en kelkaj televid-elsendoj. Jam estis realigitaj tri popularaj elsendoj: somere 1985 — la japana esperantistino Sakeo Mutoo (edzino de la bulgara esperantisto ing. R. Dargov) gastis al la televid-elsendo „Stil“ (Stilo) per originala „Ikebana“. Tiam por unua fojo la TV-jurnalistino Brigita Ĉolakova — aŭtorino de „Stil“, malfermis la pordojn de Bulgara Televido por Esperanto. Sekvis dua partopreno — decembre 1985, en la televidkonkurso „Minuto sufiĉas“, kies gajninto ricevis premion de BEA kaj IEK. Kaj venis tempo por la tria — jam sufiĉe granda manifestiĝo — la partopreno en „Ne estas tempo“. Helpe al SEDK samideano Nikola Aleksiev preparis informon pri la historio de la tutmonda kaj bulgara E-movado, kiu servis kiel bazo de la priesperanta scenaro. Dum la preparlaboroj por la filmado, krom Bojidar Aleksiev el SEDK, aktivis ankaŭ gesamideanoj Hristo Gelebov el CE de BEA kaj Veneta Baleva el redakcio „Paco“, M. Dimitrova kaj L. Mandalova el UE de BEA.

En stadio de preparado estas ankoraŭ kelkaj televid-elsendoj pri Esperanta temo. Ni kredu, ke la bone komenciĝinta kunlaboro inter BEA kaj BT montriĝos fruktodona ankaŭ estonte.

V. DIMITROVA

## UTILA INTERKONSENTO

En la komenco de la jaro la prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio Hristo Gorov kaj la prezidanto de la Centra Konsilantaro de Bulgara Numismatika Societo Dragan Vărbănov subskribis interkonsenton-kontrakton por kunlaboro uzante la internacian lingvon Esperanto. Lige kun tio estis pridiskutita komuna plano por 1986.

Per la interkonsento oni celas varbi esperantistojn el la numismataj medioj kaj numismatojn inter la esperantistoj.

Draguško PETROV

## PLIBONIGO DE LA AGADO

Omaĝe al la XIII Kongreso de BKP kaj por plibonigi sian laboron, DE de BEA en Pleven akceptis riĉenhavan programon por plenumo de l'decidoj de la 41-a kongreso de BEA kaj de la longjara programo por celebro de la 100-jariĝo de Esperanto.

La programo enĥavas multajn interesajn iniciatojn. Somere okazos lernejanaj E-brigadoj kaj esperantista tendaro por infanoj, partopreno en la ĉi-jara Revuo de E-Parolo kaj Kanto en Razgrad, en la organizotaj en julio renkontiĝoj kun reprezentantoj de la ĝemelurboj. Okazos ankaŭ la jam tradiciaj somera junulara labor-brigado kun partopreno de eksterlandanoj kaj turista marŝo. Oni efektigos komunajn iniciatojn kun la Urba Komitato por Defendo de la Paco. La lokaj esperantistoj aktive partoprenos en la celebrado de la 9-a de Majo — la tago de la venko super hitlera faŝismo kaj de la 24-a de Majo — festo de la bulgara alfabeto kaj kulturo.

DE de BEA helpas al la societoj en la distrikto aktivigi sian laboron por altiro de novaj membroj, por fondo de novaj societoj en Pordim kaj Guljanci, plibonigante la laboron lige kun la instruado de Esperanto tiel en la E-kursoj por civitanoj kiel ankaŭ en la lernejo.

Jorjeta KAMENOPOLSKA

## SUKCESA KURSO POR E-INSTRUISTOJ

Lige kun la fakultativa lernado de Esperanto ĉi-jare dum la vintraj ferioj oni organizis instruistajn kursojn de ĉiuj gradoj. Domastro de la kursoj, kiujn partoprenis 50 esperantistoj el la tuta lando, estis DE de BEA en Pleven. La kursojn, organizitajn de CE de BEA kaj de DE de BEA en Pleven, gvidis d-rino Emilija Kanjovska (Pleven), Nikola Uzunov (Haskovo) kaj Maria Petrovska (Vेलiko Tărnovo).

La 25-an de januaro j. k. en la solenaĵo lige kun finiĝo de la kursoj la prezidantino de DE de BEA en Pleven Vâlka Dobрева gratulis la gekursanojn kaj iliajn gvidantojn pro la sukcesa laboro kaj enmanigis al ili la diplomojn.

J. K.

## POEZIA RECITALO EN BANKJA

Kiam antaŭ 80 jaroj la granda bulgara poeto Ivan Vazov verkis „Mateno en Bankja“, li eĉ ne supozis, ke iam liaj versoj eksonos en Esperanto — la lingvo, al kiu li rilatis kun kompreno kaj estimo. En la poezia recitalo, dediĉita al urbo Bankja kaj Ljulin-montaro, okazinta la 22-an de januaro j. k. oni aŭdis ankaŭ verkojn de aliaj aŭtoroj: Hristo Smirnenski, Jordan Radiĉkov, Asen Bosev, Nikolaj Zidarov kaj Ivan Kolarov.

La recitalon organizis la Konsilantaro pri Kulturo, la esperantistoj el societo „Solidareco“, la membroj de la literatura rondo „Ivan Vazov“ en Bankja, la ĉefurba literatura E-rondo „Asen Grigorov“ kaj la Esperanto-Domo de Kulturo „Maksim Gorkij“. Per versaĵoj kaj kantoj sin prezentis: la merita artisto Veselin Damjanov, Mihail Zdravev, Ani Sotirova, Maria Angelova, Mihail Ĉobanov. Zlatko Graovski kaj Jana Ĉobanova ridigis la publikon per ŝopa humuro. Docento Konstantin Popov, Rumjana Kamenska el la literatura rondo „Ivan Vazov“ kaj Nevena Nedelĉeva, Antoaneta Atanasova kaj Nikolina Slavĉeva — el E-literatura rondo „Asen Grigorov“ plenumis proprajn verkojn.

La plenumitajn dum la recitalo verkojn oni inkluzivos en malgranda verskolekto.

<sup>1</sup>Sopoj — loĝantoj de la regiono ĉirkaŭ Sofio, famaj pro sia sento pri humuro.

Inĝ. Atanas IVANOV

## SOCIETO „SUPRENIRO“ AKTIVAS

En novembro pasintjare, dank' al la helpo de DE de BEA en Stara Zagora, nia E-societo „Supreniro“ en urbo Pavel Banja aktivigis sian laboron. Estis akceptitaj 15 novaj membroj, precipe gejunuloj, por kiuj ni speciale organizis kurson.

Ĉiuj membroj de la societo ricevas revuon „Bulgara Esperantisto“ kaj aliajn E-periodaĵojn — „Paco“, „Scienca Mondo“, k. a., dank' al kiuj ni havas eblecon pliriĝi niajn konojn pri la landa kaj monda E-movado.

Alian kurson ni organizis en nia lernejo. Ĝin gvidas la juna instruistino Elena Stajkova.

Ni intencas organizi ankaŭ ekskursojn kaj renkontiĝojn kun aliaj E-societoj, aranĝi E-ekspozicion.

Hristo RASTEV

## RENKONTIĜO DE E-GENERACIOJ



Por memoro al la ĉiam junaj veteranoj

Foto: Georgi STAJKOV

La 23-an de januaro 1986 geaktivuloj de E-societo „Nigra Maro“ en Burgas bonvenigis en sia nova klubejo karajn gastojn — 16 esperantistojn-veteranojn el la urbo.

Speciale por tiu renkontiĝo la dommastroj preparis surprizon. Georgi Stojkov kaj Angelin Hristov aranĝis du fototabulojn nome „La unuaj esperantistoj en Burgas“ kaj „Esperantistoj-antifaŝistoj el Burgas“.

La veteranoj rakontis pri sia vivo kaj esperantista agado. La parolado de la prezidanto de DE de BEA en Burgas Elena Stojkova emociis la ĉeestantojn. Per la vortoj de la parolantino ili revenis en la malnovajn E-klubejojn, en la tempon de la kontraŭfaŝisma batalo, kiam Esperanto helpis la agadon de la Komunista partio.

Fine la prezidanto de la societo Nikola Petrov bondeziris al la gastoj sanon kaj ankoraŭ multajn jarojn en la E-medio en Burgas.

Svetlana HRISTOVA

## ALMANAKO DE MEDICINISTOJ

La estraro de la Medicina Esperanto-Sekcio ĉe BEA sin turnas por helpo al ĉiuj esperantistoj, kiuj posedas donitaĵojn pri la nomoj, adresoj, biografio, fotojn kaj aliajn materialojn pri bulgaraj medicinistoj-esperantistoj: kuracistoj, stomatologoj, flegistinoj, akuŝistinoj, apotekistoj, veterinaroj k. a. — forpasintaj aŭ vivantaj, kiuj kontribuis aŭ partoprenis la esperantistan movadon. Tiuj materialoj estas necesaj por eldono de Almanako okaze de la 30-jariĝo de Medicina Esperanto-Sekcio kaj 80-jara datreveno de la fondiĝo de Bulgara Esperantista Asocio. La materialojn sendu al la adreso de BEA, Sofio bul. Ĥr. Botev 97, (Medicina Sekcio).





## DEZIRAS KORESPONDI

### POLLANDO

Ursula Jaworska (25-jara fraŭlino) — PL-07-300, Ostrów-Maz., str. Wyczółkowskiego 4 — pri turismo, literaturo kaj nekonvencijaj metodoj de esploro kaj sanigo en la medicino.

18-jaraj lernantoj Robert Plewka — PL-58-305 Wąbnych, ul. Rynhova 2 kaj Dariusz Aejniczak — PL-58-305 Wąbnych, ul. Fredry 10/2 — pri sporto, turismo, muziko, historio, literaturo.

Stanisław Debski (21-jara) — PL-97-122 Różyca, str. Główna 55 — pli literaturo, filozofio, fotografio, turismo.

Barbara Kruszevska (18-jara) — PL-19-300 ELK. ul. Słowackiego 9/2 — turismo, muziko, modo; kolektas mod. kaj muzikrevuojn.

Marian Pauliszyn (23-jara komencanto) — PL-67-115 Bytom Odrz. ul. Młyńska 26 — pri literaturo, muziko, pri fremdaj lingvoj — germana, itala.

Teresa Dorenska (28-jara) — PL-11-304 Bredynki woj. Olsztyn — pri muziko, filmoj, poezio, E-literaturo.

Edyta Organowska (17-jara lernantino) — woj. Białystok, PL-16-200 Dąbrowa BT uh. Kunawina 64/2 — pri geografio, biologio, PM kaj BK.

Danuta Skriba (40-jara) — woj. Bydgoszcz, PL-86-022 Dobrcz. Włoki — kun bulgaraj geamikoj.

Geedzoj Waligóra (29-jaraj) — PL-42-600 Tarnowskie Góry, ul. Ułanska 12a/2 — pri historio, literaturo, vojaĝoj, BK kaj PM.

### SOVET-UNIO

Vladimir Lebedev (38-jara inĝeniero-rkonstruisto) — SU-127521 Moskvo, Seremetjevskaja str. 71-B k. 18 kv. 11 — kun bulgaraj esperantistoj.

Olga Karnova (26-jara filologino) — SU-301860, Tulska obl. g. Jefremov, ul. Slovatskogo vostonija d. 4, kv. 50 — pri muziko, arto literaturo kaj lingvoj (hispana kaj portugala).

Nikolaj Vološin (23-jara pentristo) — SU-263018 Luck Volinskaja obl. ul. Lvovskaja 63a kv. 81 — pri ĉt, interŝanĝos BK.

Nadejda Metel'jova (24-jara) — SU-610021 u. Kirov, str. Vorovskogo, d. 102—144 — pri naciaj kulturoj, historio, foto, naturo, PM, BK, esperantaj.

Helena Drozdova (14-jara lernantino) — Rostov-Don-90, Staĉki 190/16, kv. 92 — kolektas BK, PM, kalendaretojn, monerojn.

12—17-jaraj gelernantoj — SU-454000 Ĉeljabinsk, Dvorec Pionerov, Esperanta klubo — kun geamikoj el ĉiuj landoj.

11—12-jaraj gelernantoj — SU-350062, u. Krasnodar, str. Turgeneva 153, ap. 71, Oksana Kolesniĉenko — kun geknaboj el ĉiuj landoj.

Kabjan Edimbaev (23-jara instruisto) — SU-638516, Kazahskaja SSR, Pavlodarskaja oblastj, Irtyŝskij rajon v. Amangeldi — pri ĉiuj temoj, kun ĉiuj landoj.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BAĈEV, Mariana ELENOVA, Dimitra ĤAĜIEV, Maria Jankova, Krăstju KARUCIN, Georgi MIĤALĤOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika redaktoro: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

## ENHAVO

|                                                              |    |
|--------------------------------------------------------------|----|
| ĤAIM LEVI. Scienca programo por plua prospero                | 11 |
| NANO KJUĈUKOV. Rimarkinda datreveno                          | 1  |
| Prof. H. TONKIN. Dankletero                                  | 2  |
| RADI BANĈEVSKI. La Kosmo — por pacaj celoj                   | 3  |
| Prof. d-ro KIRIL POPOV. Fidelaj agantoj de nia sanprotektado | 4  |
| DIMITAR PAPAŖOV. Realigita revo                              | 5  |
| D-ro WALTER HUBE. La Internacia E-muzeo en Vieno.            | 6  |
| VENETA BALEVA. Instru-problemoj el mia vidpunkto             | 8  |
| GEORGI DEJANOV. La eksperimento estigas tradicio             | 9  |
| ATANAS ILKOV. Foresta instruado                              | 9  |
| HO MO GO. En la lando de lotusfloroj                         | 8  |
| NENO JANEV. Por nia lingva kulturo                           | 10 |
| VENELIN MITEV. Valora cldonaĵo                               | 11 |
| VENELIN MITEV. Optimisma tragedio                            | 12 |
| ĤRISTO GOROV. „Tri militoj“                                  | 13 |
| SLAV ĤR. KARASLAVOV. „Komunistoj“                            | 13 |
| DISTROJ                                                      | 14 |
| ENLANDA MOVADO                                               | 15 |
| CVETANA EVGENIEVA. Trovaĵo de la jarcento                    | IV |

Sur la unua kovrilpaĝo: La unua en la mondo kosmonaŭto — la soveta civitano JURIJ ALEKSEJEVIĈ GAGARIN gaste en Bulgario.

## DU JUBILEOJ

La 29-an de novembro 1985 la urba E-klubejo en Plovdiv estis plenplena de esperantistoj el ĉiuj urbaj E-societoj. Laŭ iniciato de DE de BEA kaj de societo „Kulturo“ estis celebritaj la 50-jara E-agado de la konata bulgara esperantisto kaj honora membro de BEA Mihail Danĉev kaj la 75-jariĝo de la multjara aktivo de societo „Kulturo“ Dimitar Milev.

V. Kurteva, prezidantino de societo „Kulturo“, legis biografiajn notojn pri la jubileuloj. M. Danĉev rakontis interesajn momentojn el sia E-agado: pri siaj renkontiĝoj kun Trifon Ĥristovski kaj Ivan Krestanov, pri sia kunlaboro kun prof. Asen Zlatarov kaj kun Iv. Bataklijev, pri la fondo de la Plovdiva distrikta E-komitato, kies iniciatinto kaj fondinto li estas.

Reprezentantoj de ĉiuj urbaj societoj kaj unuopaj esperantistoj kore salutis la jubileulojn.

Vladimir JELEV

## GRATULOJN!

Nia „Verda rosmaro“ Kiril Kalĉev el Loveĉ, multjara sindonema merita esperantisto, jam fariĝis 60-jara. Al lia komplezemo ni ŝuldas multajn bonkvalitajn kaj interesajn fotojn pri gravaj esperantaj aranĝoj. El-korajn gratulojn kaj dankojn!

„BE“

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordono „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:  
„BULGARA ESPERANTISTO“  
Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario P. K. 66  
1 000 Sofio  
Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

# Trovajo de la jarcento



La Distrikta Muzeon en Vraca la specialistoj nomas Palaco de la Tracoj. Ĝi posedas la plej riĉajn en nia lando kaj en Eŭropo kolektojn de traca armilaro, ekipaĵo, objektoj por la ĉiutaga vivo, ornamaĵoj. La 9-an de januaro j. k. la Muzeo pliriĉiĝis per la antaŭ ne-longe trovita en vilaĝo Rogozen trezoro, konsistanta el 165 antikvaj vazoj — kruĉoj k. a., ellaboritaj el orita argento. Laŭ la opinio de la sciencisto-arknologo prof. Bogdan Nikolov, ne ekzistas ĝis nun alia kolekto tiel riĉa laŭ nombro de la objektoj, beleco de la ornamaĵoj, laŭ majstra ellaboro kaj fajneco de la reliefaĵ figuroj.

La malkovro de la trezoro estiĝis preskaŭ sensacio. Preparante fosadojn por akvokondukilo en sia ĝardeno en Rogozen, la traktoristo Ivan Dimitrov Savov elfosis en unu loko 65 vazojn. Tre mirigita, sed konscia pri la valoro de la trovaĵo, li sciigis pri tio al la vilaĝestro, kaj poste al la Distrikta Arkeologia Muzeo. La arkeologoj Bogdan Nikolov, Spas Mašov kaj Plamen Ivanov, alvenintaj surloke la 6-an de januaro, konstatis, ke tio estas argentaj vazoj por la ĉiutaga vivo, riĉe ornamitaj per reliefaĵ oritaj figuroj kaj ornamaĵoj. Kvin metrojn for de tiu loko ili trovis ankoraŭ 100 similajn vazojn...

Supozeble, la tuta kolekto estis posedado de nobela traca familio loĝinta tie antaŭ 2400 jaroj. Pro la militiroj, kiuj damaĝis la landon de la tracoj dum la dua duono de IV jc a. n. e., la trezoro certe estis elmetita al danĝero. Ĝia posedanto dividis ĝin en du partojn kaj kaŝis ĝin ĉi-tie. Pri la sorto de la traco oni nenion scias — eble li

pereis en batalo aŭ estis militkaptita.

La gravecon de tiu nova trovaĵo, pruvanta ankoraŭfoje la altan kulturon de la tracoj, komentas la sciencisto-arknologo prof. Bogdan Nikolov:

— Tiu trovaĵo estas vera fonto de novaj konoj por la bulgara trakologio, eĉ mi dirus — ĝi estas trovaĵo de la jarcento. Ni jam rajtas paroli pri nia propra traca belarta skolo en la mezo de IV jc.



a. n. e. En ĝi superregas la malnova loka tradicio, kio atestas pri regiona stildirekto. Krome, sur tiuj vazoj ni trovas motivojn, similajn al

tiuj sur objektoj trovitaj en Rumanio. Sur unu el ili ni vidas mitan scenon, jam konatan de la fosadoj ĉe Agigjöl — estas prezentitaj la samaj rabobirdo, fiŝo, kapro kaj cervo. La saman scenon oni vidas ankaŭ sur la vangoparto de la argenta kasko, trovita en Rumanio kaj nun eksponita en la muzeo en Detrojto. Verŝajne la artlaborejo, kie oni ellaboradis tiujn objektojn troviĝis ie en la regiono de hodiaŭa Nordokcidenta Bulgario. Kiel apogo de tiu ĉi opinio estas ankoraŭ kelkaj scenoj, prezentitaj sur la kruĉetoj. Sur unu el ili, en la sama stilo estas prezentitaj grifono kaj birdo tenanta en sia beko serpenton. La bestoj similas al tiuj el Rumanio. Sur alia kruĉeto estas prezentita ĉassceno: du rajdantoj (la figuroj ripetigas), kaj antaŭ ili — apro.

Ĝuste en tiu bildo oni trovas tre grandan similecon kun la trezoro trovita en vilaĝo Letnica, distrikto de Loveĉ. Ripetigas la vestaĵo de la rajdantoj, la bestoj kaj la ornamaĵoj. Surprizas iuj el la kruĉetoj. Krom la jam konataj mitaj scenoj, en kiuj estas prezentitaj konataj dioj kaj herooj kiel Helios, Gea, la herooj de Heraklo, sur ili estas prezentitaj ankaŭ nekonataj por ni bildoj, kies sencon oni ankoraŭ ne sukcesis klarigi. Tiel estas, ĉar la informoj pri la religio kaj mitoj de la tracoj, kiujn lasis al ni Herodoto, ne estas plenaj. En la religio de la antikvaj tracoj ekzistas pli malnova tavolo de diaĵoj, kiujn ni eke de nun devas iom post iom ekkonii. Kaj ĝuste tiu ĉi trezoro helpas al ni plenigi la mankojn en niaj sciigoj pri la spirita vivo de la tracoj.

La 165 antikvaj vazoj jam estas eksponitaj en la muzeo en Vraca. Ili brilas per argentaj kaj oraj lumradioj, admirigas pro siaj fajneco kaj majstra ellaboro. Benita estu la mano de la antikva majstro, kiu kreis tion. Ĝa beleco — senfalsa, pure brila, sorĉoplena, atinginta nin tra la jarcentoj de forgeso. En la geometriaĵ, vegetaĵaj kaj bestaj motivoj, en la mitaj kaj ĉasaj scenoj, en la figuroj de diinoj kaj dioj li enmetis sian estetikajn idealon pri harmonio kaj perfekteco, sian imagon pri la surtera kaj „transa“ mondo, pri bono kaj malbono, pri la transiraĵ kaj eternaj fenomenoj en nia mondo. Sur 13 el la antikvaj vazoj estas ĉizitaj grekliteraj surskriboj, sub kiuj oni legas tracajn nomojn, verŝajne de nobeluloj donacintaj tiujn vazojn al ilia posedinto. Per la forto de la imago-povo oni povus vidi riĉajn festenojn honore al venko en batalo aŭ okaze de granda familia festo, la bongustajn mangaĵojn, la ŝaŭmantan fajrebrilan vivon en la pokaĵoj, kaj riĉan kulturon, kiun eke de nun la trakologio esploras.

Cvetana EVGENIEVA  
Fotografioj: Zdravka JOLOVA